



Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2004 numero 1-a: januaro / februaro
kun informoj pri renkontoj ekde la 15-a de januaro



Unuaj esperantistaj korespondaĵoj ricevitaj de la lernantoj de la popola lernejo "Ecole des Monts" Le Locle, Svislando: aŭgusto 1903 – aprilo 1904.

La sabaton 24-an de aprilo, lige al la jarkunveno jubilea de Svisa Esperanto-Societo, estos digne festata en Les Brenets la centjarigo de la unua instru-eksperimento de esperanto en elementa lernejo fare de la instruisto Edouard Ducommun. Nepre partoprenu tiun historian eventon, kiu digne rememorigos la personecon de tre signifa pioniro de la lingvo internacia.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfolio 5031,
CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto: claud.gacond@ne.ch &
gacond@bluewin.ch

& ĉe CDELI: 032 967 68 55,
hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29:
indiki: por Claude GACOND

Redaktaj kunlaborantoj:
Nancy FONTANNAZ, Andy KÜNZLI,
Richard SCHNELLER.

SES informas

Redaktaj datlimoj

por la venontaj numeroj

2004-2: marto-aprilo: februare 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de marto.

2004-3: majo-aŭgusto: aprile 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de majo.

2004-4: septembro-oktobro: aŭguste 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de septembro.

2004-5: novembro-decembro: oktobre 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de novembro.

SES-estraro

Bruno Graf, prezidanto, Jurastrasse 23,
3063 Ittigen/Bern. Tel.: 031 921 44 59.
Retpoŝto: bgraf.o@bluewin.ch.

Dietrich Weidmann, vicprezidanto,
PF 301, 8034 Zürich. Tel.: 01 251 50
25. Retpoŝto: info@esperanto.ch.

Nicole Margot, sekretario, Chemin des
Lys 4, 1010 Lausanne. Tel.: 021 653 14
67. Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch.

Hans-Werner Grossmann, kaskisto,
Esperanto-Servo, PF 262, 4132
MuttENZ 1. Tel.: 076 460 8992. Ret-
poŝto: esperanto-servo@bluewin.ch.

Chiara Fabbri, peranto itallingva kaj
junulara, Sägenstrasse 8, 7000 Chur.
Retpoŝto: chiara-fp@bluewin.ch.

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo 2300 La Chaux-de-
Fonds

Kotizoj al SES

kun ricevado de *SES informas*.

fr. 10	infanoj	ĝis 18 jaroj
fr. 20	junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
fr. 35	plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
fr. 50	paroj	"
fr. 70	patronoj	"
fr. 25	nura abono al	<i>SES informas</i>



Svisa kalendaro

2004 Januare

- 17: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
18: Zürich: Kunveno.
19: Lausanne: LES: Projekciado de 3 filmoj.
20: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
29: Basel: ESB: Ĝenerala jarkunveno.
31: Chaux-de-Fonds: KCE: Asembleo.
31-1 feb.: Chaux-de-Fonds: KCE: Semajnfino.

Februare

- 1: Zürich: ESZ: Kunveno.
2: Lausanne: LES: Ĝenerala Asembleo.
3: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
4: Wil: EKW: Jarkunveno.
6-28: Vevey: Ekspozicio pri esperanto.
7: Vevey: SES-jubilea sabato kun Andy Künzli.
8: Zürich: ESZ: kunveno.
13: Mitholz: JES-SES: Lötschberg-tunela vizito.
13-15: Kandersteg: JES: Svisa vintra semajnfino.
14: Zürich: ESZ: Ĝenerala kunveno.
15: Redakta datlimo de SES informas.
15: Zürich: ESZ: Kunveno.
17: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
21: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
22: Zürich: ESZ: Kunveno.
28-29: Chaux-de-Fonds: KCE: Semajnfino.
29: Zürich: ESZ: Kunveno.

Marte

Marte-aprile: Le Locle. Ekspozicio pri esperanto.

- 1: Lausanne: LES: kunveno.
3: Wil: EKW: Kunveno.
9: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
13: Rotkreuz: SAEF: 42-a GERL.
20: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
23: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
27-28: Chaux-de-Fonds: KCE: Semajnfino.

Aprile

3. Rotkreuz: SAEF: Ĝenerala kunveno.
5: Lausanne: LES: kunveno kun Claude Gacond.
7: Wil: EKW: Kunveno.
8-12: Chaux-de-Fonds: KCE: Internacia kursaro.
9: Strasbourg: Manifestacio.
15: Redakta datlimo de SES informas.
24: Les Brenets: SES: Ĝenerala Asembleo.
24-25: Locle-Brenets: SES jubilea semajnfino.

Maje

- 3: Lausanne: LES: kunveno.
4: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
15: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato
15-16: JES: Kurs-semajnfino.
18: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
22-23: Chaux-de-Fonds: KCE: Semajnfino.

Junie

- Dato fikso:** Lausanne: LES: Ekskurso.
8: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
19: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
22: Chaux-de-Fonds: CDELI: Studrondo.
26: Basel: ESB: kunveno minigolfa.

Julie

- 5-10: Grindelwald: KCE: naturamika semajno.
13-18: Chaux-de-Fonds: KCE: Internacia kursaro.
20-25: Chaux-de-Fonds: KCE: Internacia kursaro.
24-31: Beijing (Ĉinio): 89-a Universala Kongreso.

Aŭguste

- 2-6: Engadino: KCE: romanĉa semajno.
7-14: Chaux-de-Fonds: KCE: Kultura semajno.
14-21: Chaux-de-Fonds: KCE: Seminario.
15: Redakta datlimo de SES informas.

Septembre

- 25-26: Chaux-de-Fonds: KCE: Semajnfino.

Vivo de SES

**Festado de la centjara jubileo de la
fondo de Svisa Esperanto-Societo**

Dua rendezuo en Vevey

**Historio de esperanto en Svislando dum la
cent pasintaj jaroj de la vivo de SES**

Sabaton 7-an de februaro 2004

Hôtel des Familles

Rue des Communaux 20 (apud la stacidomo), Vevey

Post la entuziasmiga festotago de la 27-a de septembro 2003 en Lausanne-Ouchy kaj Rolle, alvenis tutcerte la momento konatiĝi kun la historio mem de esperanto en Svislando dum la centjara vivo de SES. Nia historiisto **Andy Künzli**, kiu nelacigeble vizitadas la arhivejon de CDELI kaj aliajn dokumenteojn cele al la pretigo de grava enciklopedia verko pri esperanto kaj planlingvistiko en Svislando, tutcerte pasiigos vin per sia raportado pri la sekvaj temoj:

- 1) Volapük kaj la Volapük-movado en Svislando.
- 2) La ekdisvolviĝo de esperanto en Svislando (mallonge, ĉar jam okazis kelkaj pluraj raportoj pri tio).
- 3) La fruaj protagonistoj: Ernest Naville, Auguste Forel, Hector Hodler, René de Saussure (ankaŭ ĉefe rememorige).
- 4) UEA, Hans Jakob, la Biblioteko Hodler.
- 5) La Ido-krizo kaj la Ido-movado kun Friedrich Schneeberger, la konkurenco de Occidental.

- 6) Ligo de Nacioj, Gonzague de Reynold.
- 7) Disvastiĝo de esperanto laŭregione kaj fake.
- 8) IALA kaj Interlingua (Debrunner, Funke, Schwyzer).
- 9) La skismo UEA-IEL.
- 10) Agado de unuopuloj nerekte ligitaj al la esperanto-movado: Erbetta kaj Grajnoj en Vento, William Perrenoud kaj la geonismo, Marc Rohrbach kaj la movado JEAN, Jacques Mühlethaler kaj la movado Instrumento al Paco, k.a., precipe de post la dua mondmilito.

Kial renkontiĝi en Vevey por la proponita prihistoria studo? Ĉar dānk'al la iniciato de Charlotte Blanc-Maillard kaj Yvette Goy en la ekspoziciejo de la butikoj "Magasin du Monde" inaŭguriĝos la vendredon 6-an de februaro ekspozicio pri la temo *L'espéranto, une langue bien vivante*. Nia kolektiva vizito de la ekspozicio alportos pruvon pri niaj ekzisto kaj dinamismo al la magazinestroj, al la gazetaro kaj al la aŭtoritatoj.

Horaro de la renkonto

Ekde la 10h00: Ricevo de la alvenantoj kaj kafumo ĉe Hôtel des Familles.

11h00: Malfermo de la rendevuo fare de Bruno Graf, prezidanto de SES.

11h15-12h15: Intimiĝo pri la historio de SES kun Andy Künzli kaj Claude Gacond, laŭ la supre anoncita programo.

12h30-13h30: Komuna tagmanĝo. Elekto inter du menuoj: Menuo A (frankoj 21.-): Vaŭda menuo kun viando. Menuo B (frankoj 25.-): Vaŭda menuo vegetarana.

14h00-15h00: Intimiĝo pri la historio de SES kun Andy Künzli kaj Claude Gacond, sekvo kaj konkludo.

15h30: Sub la gvido de Charlotte Blanc-Maillard iro al la butikoj "Magasin du Monde" por invadi la ekspozicion *L'espéranto, une langue bien vivante* kaj ĝui pri agrabla sensoifiga kaj biskvituma konkludo.

16h30: Fermo de la dua jubilea rendevuo en la ekspoziciejo.

Partoprenkotizo: Por la kovro de la organizaj kostoj estos surloke petata kotizo de po frankoj 15.- por persono. JES-anoj senpage.

Aliĝoj: Ne nur por la organizo de la biskvituma konkludo en la ekspoziciejo, sed ankaŭ por la antaŭmendo de la tagmanĝaj menuoj, la partoprenontoj nealiĝintaj ĝis nun bonvolu sin nepre anonci **kiel eble plej rapide, sed plej malfrue ĝis la 2-a de februaro**, al Claude Gacond, Chevreuils 14, 2300 La Chaux-de-Fonds, telefono: 032 926 52 32, retadreso: gacond@bluewin.ch,

indikante ne nur siajn nomojn familian kaj individuan, adreson poŝtan, telefonnumeron kaj retadreson, sed ankaŭ la deziratan tagmenuon.

Ĝis la 5-a de januaro 2004 jam alvenis la sekvaj aliĝoj: 1. Anita Altherr, Bernex; 2. Françoise Badoux, Lausanne; 3. Charlotte Blanc-Maillard, Vevey; 4. Pierrette Blanchet, Lausanne; 5. David Buhlmann, Prilly; 6-7. Jacques kaj Lucienne Dovat, Renens; 8. Nancy Fontannaz, Pully; 9. Georgette Friedly, Bernex; 10-11. Andrée kaj Claude Gacond, La Chaux-de-Fonds; 12. Yvette Goy, Cully; 13. Bruno Graf, Ittigen; 14. Marianne Huber, Lausanne; 15. Yvette Humbert-Fink, Yverdon; 16. Mireille Grosjean, Les Brenets; 17-18. Stefano kaj Sanjiv Keller, Lausanne; 19. Andy Künzli, Bern; 20-21. Eliane kaj Jean-Jacques Lavanchy, La Tour-de-Peilz; 22. Nicole Margot, Lausanne; 23-24. Claude kaj Nicole Piron, Gland; 25-26. Ges-roj François Randin, Lausanne; 27. Dieter Rooke, Oensingen; 28. André Sandoz, La Chaux-de-Fonds; 29. Richard Schneller, Kronbühl; 30. Paul Scherer, Emmenbrücke.

Longigu la liston de la partoprenontoj!

-oOo-

Jubilea Ĝenerala Asembleo de SES

24-an de aprilo en Les Brenets

La Ĝenerala Asembleo de Svisa Esperanto-Societo ĉijare okazos kadre de grava jubilea festa renkonto en Les Brenets apud Le Locle, vilaĝo kie vivis la esperanto-pioniro Edouard Ducommun. Kiel montras la kovril-paĝo de nia bulteno, ekzakte antaŭ cent jaroj en aprilo 1904 konkludiĝis lia pionira eksperimento instruadi esperanton en publika lernejo per rikolto de poŝtkartoj el la tuta mondo.

Dum akcepta kafumo en la vilaĝa gimnastikejo, sub la aŭspicio de la lokaj aŭtoritatoj, kun la helpo de la historiisto Pierre Deléglise, kiu prezentos ekspozicion pri Edouard Ducommun, kun kontribuoj de infanoj kaj instruistoj de la lernejo La Grande Ourse, en kiu esperanto estas instruata, kaj espereble kun grandnombra partopreno de esperanto-praktikantoj el tuta Svislando, ni digne festos la centjariĝon de Svisa Esperanto-Societo.

Sekvos ŝipa veturo sur la lago de Les Brenets al la restoracio de la akvofalo "Saut du Doubs", kie konklude al bankedo paralele

disvolviĝos esperantlingve la Ĝenerala Asembleo de SES kaj franclingve informado pri la nunaj atingoj de esperanto.

Post admiro de la akvofalo, dum promena reveno al la vilaĝo Les Brenets la marŝantoj haltos ĉe esperanto-stelo, kiun Edouard Ducommun pentris kontraŭ la rokaro komence de la dudeka jarcento kaj kiun la esperantanoj de Les Brenets fidele refarbas. Konkludiĝos la renkonto per teumo ĉe la ekspozicio pri Edouard Ducommun.

Kaj por tiuj, kiuj deziros ne tuj rehejmiĝi, la saman sabaton okazos vespermanĝo kaj tranoktado en la hotelo "La clef des champs" sur la monto "Tête de Ran", kie finaprile floras jonkviloj en la paŝtejoj. Kaj la dimanĉon 25-an de aprilo ni tiel povos migradi sur paŝtejoj inundataj de jonkviloj.

Aldone al nia bulteno du informiloj donas al vi la eblon anonci vian aliĝon ĉu nur al la sabata jubilea renkonto, ĉu al ambaŭ okazaĵoj. Sed ĉar en la hotelo de Tête de Ran la nombro de la litoj estas limigita, nur maksimume la kvadeko da plej rapidaj aliĝantoj povos esti akceptitaj.

Do ĝis baldaŭ en Les Brenets, kaj eble eĉ ankaŭ sur la monto Tête de Ran, por digne festadi la centjariĝon Svisa Esperanto-Societo.

Claude Gacond

-oOo-

Donacoj

Donacoj en frankoj al SES: Dorothee Baumgartner, Meyrin: 50; David Buhlmann, Prilly: 25; Tazio Carlevaro, Bellinzona: 100; Verena & Gabriel Chaves-Walder, Flawil: 50; Lucienne Dovat, Renens: 95; Grandjean Rémy, Fontainemelon: 20; Mireille Grosjean,

Les Brenets: 100; Instanet Sàrl, Château-d'Oex: 10; Alois Koller, Zürich: 65; Jean-Rodolphe Laederach, Peseux: 20; Tina Lanz, Clarens: 25; Parzival, Bienne: 5; Alice Quaglia, Lausanne: 65; Hans & Silvia Rey, Zürich: 75; Myriam Schwitter, Carouge: 20; Tamara Veyrat, Genève: 5; Marguerite Viredaz, Lausanne: 20; Tarzicia Visy, Zürich: 20; Annemarie Wagnière, Lausanne: 30; Fritz

Wassmann, Hinterkappelen: 65; Armin Weidmann, Urikon: 30. Sume: 875.

Donaco en frankoj por la "Agado 2003": Charlotte Blanc-Maillard, Vevey: 20. Sume: 20.

Nome de SES la kasisto Hans-Werner Grossmann kaj la redaktoro Claude Gacond dankas la registritajn donacintojn por ties malavareco.

Tutsvisa aktiveco

CDELI

Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo

Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds
Tel.: 032 967 68 55.

Fakso: 032 967 68 29, indiki: por CDELI.

Retadreso: CDELI.VCH@ne.ch

martine.schneller@ne.ch

claud.gacond@ne.ch

nancy.fontannaz@ne.ch

Studsabatoj didaktikaj ĉe CDELI

Sub la gvido de Claude Gacond, Monika Molnar kaj Stefano Keller didaktikaj studsabatoj okazantaj preskaŭ ĉiumonate ĉe CDELI alportas utilan helpon al la lernantoj kaj instruantoj de esperanto. Tial ilia frekventado estas konsilinda al ĉiuj studemuloj. Kiu volas progresi en la praktiko de esperanto, tiu rezervu la 6 venontajn sabatojn en sia agendo: **januare 17,**

februare 21, marte 20, majo 15, junio 19 kaj novembre 20.

Pretiĝo al la du venontaj sabatoj: Fine de 2003 la novembra renkonto grupigis du-dekon da studemuloj. En la du venontaj studsabatoj januara kaj februara kun Claude Gacond la supera grupo plue intimiĝos kun la vivo, penso kaj verkaro de L. L. Zamenhof per 4 studkajeroj. Novembre la partoprenantoj ekstudis aŭtobiografian leteron de L. L. Zamenhof al Alfred Michaux prezentitan laŭ 2 versioj, la originala kaj la lingve aktualigita fare de Claude Piron. Komparo inter ambaŭ tekstoj ebligas interesajn malkovrojn. La partoprenantoj ricevis la taskon tralegi ambaŭ tekstojn, kies ekzameno en la januara kunveno kondukos ne nur al historiaj konsideroj, sed ankaŭ al gramatikaj kaj stilaj ekzercoj. **Ĉiuj partoprenantoj al la januara supera grupo, kiuj ne ĉeestis novembre, nepre petu al Claude Gacond la menciitan dokumenton por ankaŭ povi ĝin tralegi.**

La meza grupo kun Monika Molnar lertiĝos en la parola uzo de la lingvo.

La komencanta grupo kun Stefano Keller akiros bazajn konojn.

Por minimuma kovro de la elspezoj estas petata partoprenkotizo de F 10.- Senpage por JES-anoj.

marte 20 por la supera grupo prelegos la historiisto Ziko Markus Sikosek, la aŭtoro de la libro *Esperanto sen mitoj*. Nuntempe li zorgas pri la Biblioteko Hector Hodler ĉe UEA. **Profitu tiun ĉi okazon renkontiĝi kun historiisto, kiu helpas objektivigi nian sintenon al esperanto.** Vidu la aldonitan informilon.

Aliĝo

Por faciligi la organizon de la aranĝo la partoprenantoj bonvolu ĉiam anonci sian aliĝon al

Claude Gacond, Esperanto, CP 5031, 2305 La Chaux-de-Fonds 5.

Reteto: gacond@bluewin.ch

Tel: 032 926 52 32 aŭ 032 967 68 55.

Horaro

9h30: Malfermo de la CDELI-salono: eblo aĉeti brokantajn kaj novajn librojn.

11h00: Oficiala malfermo kaj formiĝo de la stud-grupoj. 11h45: Kafuma paŭzo. **12h00: 2-a stud-periodo.** 12h45: Komuna tagmanĝo en la restoracio Ital'Panini, Serre 25. **14h30: 3-a stud-periodo.** 15h15: Teuma paŭzo. **15h30: 4-a stud-periodo.** **16h15: Konkludo de la renkonto** en la CDELI-salono, kie eblas resti por teumi, babili, akiri librojn ĝis la propra forirmento. **17h30: Oficiala fermo.**

Enirejo al la CDELI salono

3-a pordo nord-orienta de la biblioteka domo.

Por atingi la bibliotekon

El la stacidomo: La biblioteko situas ĉe la strato Progrès N° 33. El la stacidomo ĝi atingeblas per la buslinio 4, direkto "Hôpital". Bileto akireblas en la buso mem. Petu la haltejon "Bibliothèque".
Aŭtomobile: Ekde la urba enirejo videblas indikiloj konduke al la biblioteko.

junularo esperanta svislanda
jeunesse espérantophone suisse
junges esperantio schweiz
gioventù esperantista svizzera
giuventetgna esperantista svizra

Postfach 3324, 4002 Basel

Telefòn-numero: 061 301 2705

info@jesperanto.ch

www.jesperanto.ch

Prezidanto: Laurent BURGACHER

Sekretario: Joëlle GROSJEAN

SViS 04 – pri kio temas?

La tria eldono de la Svisa Vintra Semajnfino (SViS) okazos de la 13-a ĝis la 15-a de februaro en la agrabla urbeto Kandersteg. Kiel kutime ni ĝuos la svisan vintron skiante, sledante, promenante, kaj kompreneble... fonduante!

Vendrede ni alvenos en Kandersteg. Posttagmeze ni vizitos la konstruejon de la nova Lötschberg-tunelo en Mitgolz. Por plentempaj SViS-partoprenantoj la vizito estos senkosta, sed aliĝenda.

Sabate kaj dimanĉe ni SViS-os kiel kutime. Estas du etaj skiadejoj ĉe Ōschinensee kaj Sunnbüel kaj belegaj skipromen-vojoj laŭ la rivereto Lötschen. Por vintraj migremuloj estos malfermita la pasejo de Gemmi.

Kotizoj

Frankoj 24 por nokto, 42 por 2 noktoj + 6.- krompago por ne-membroj de JES aŭ TEJO.

La kotizo enkludas la tranokto(j)n, la matenmanĝoj(j)n kaj la vespermanĝoj(j)n. Por la tagmanĝoj ni mem zorgos. Nepre kunportu dormosakon.

Por pli da informoj vidu ĉe www.jesperanto.ch aŭ skribu al svis@jesperanto.ch.

Interesatoj bonvolu aliĝi kiel eble plej rapide.

Kurssemajnfino, 15-16 majo.

Por kreskigi nian membraron, ni konstatis, ke nepras organizi kurssemajnfinojn por junuloj. Ni klopodos allogi junulojn el ĉiuj lingvaj regionoj de Svislando.

Benno Frauchiger.

Invito al ĉiuj

por vizito ĉe la konstruejo de la nova Lötschberg-tunelo.

Tradicie Svislando konstruas je ĉiuj cent jaroj du grandajn fervojajn tunelojn tra la Alpoj. Unu tra Gotthard, la alia tra Lötschberg. Jam pasis nun pli malpli cent jaroj ekde la lastaj konstruadoj, do tial denove du tiaj fervojaj tuneloj estas konstruiĝantaj.

Ĉar vi certe ne volas maltrafi tiun esceptan okazon por sperti tunelkonstruadon etoson, JES invitas vin por viziti la konstruejon de la Lötschberg-tunelo en Mitholz (inter Frutigen kaj Kandersteg) je vendredo, la 13-an de februaro 2004, je la 14-a horo.

Ni atentigas, ke la nombro de partoprenantoj estas limigota, la kostoj estos po frankoj 10.- por persono.

Por aliĝo kaj por pli precizaj informoj kontaktu Benno Frauchiger tel. 061 301 27 05.

aŭ benno.frauchiger@bluewin.ch

aŭ skribu al: Junularo Esperanta Svislanda, Postfach 3324, 4002 Basel.

Trajnhoraro por la vizito de la tunelo:

Ire: Bern: 12h22, Frutigen: 13h07.

Brig: 11h59, Frutigen: 12h50.

Frutigen: 13h43 (buso), Mitholz: 14h00.

Revene: Mitholz: 16h23 (buso), Frutigen: 16h45.

Frutigen: 17h08, Kandersteg: 17h24.

Frutigen: 16h51, Bern: 17h42.

Ni renkontiĝos ĉe la stacidomo de Frutigen je la 13h15, de kie ni kune busos ĝis Mitholz.

KCE

Kultura Centro Esperantista

Strato Postiers 27, Poŝtako 311

2301 La Chaux-de-Fonds.

Tel. kaj fakso: (032) 926 74 07.

kce.esperanto@bluewin.ch

Programo

Sen alia indiko la menciita aranĝo okazos ĉe KCE mem.

Januare 31: Ordinara asembleo de KCE.

31 & februare 1: Kun d-ino Perla Martinelli: Edmond Privat: lia vivo, lia verkaro.

Februare 28-29: Kultura semajnfino kun d-ro Marc Oostendorp (univer-

sitato de Amsterdam): Kompreni Noam Chomsky. (konfirmota)

Marte 27: Ordinara Asembleo de Kooperativo de Literatura Foiro (ne publika)

27-28: Kultura semajnfino kun d-ro Giorgio Silfer: Eŭropa Unio sojle al la nova Konstitucia Traktato.

Aprile 8-12: Plurnivela internacia kursaro: komencantoj, progresantoj, esperanto-metodiko.

Maje 22-23: Kultura semajnfino pri Ruslando kun Anatolo Gončarov.

Julie 05-10: Naturamika semajno en Grindelwald kun Francisko Degoul.

Julie 13-18: Plurnivela internacia kursaro: unua semajno.

20-25: Plurnivela internacia kursaro: dua semajno.

Aŭguste 02-06: Naturamika kaj romanĉa semajno en Engadino (konfirmota).

07-14: Kultura esperanto-semajno. En la programo: muziko, teatro, prelegoj, studgrupoj, atelieroj, ekskursoj kaj simpozio pri la esenco kaj estonteco de Esperantio (en kongresejo kun teatro).

14-21: Seminario por la trejnado de kulturaj manaĝeroj kunlabore kun TEJO (parte ekster la domo Naville).

Septembre 25-26: Kultura semajnfino pri muziko, prelegos kaj kantos Georg Roessler kaj Jean-Thierry von Büren (konfirmota).

Sekvos aliaj kulturaj semajnfinoj en oktobro kaj novembro, kaj zamenhofologiaj tagoj en decembro 2004.

Interesatoj petu la detalan informilon.

SAEF

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojoj
Gertrud EGGENBERGER, Wurmbühlstr. 10
8405 Winterthur & 052 233 47 64
gertrud.eggenberger@bluewin.ch

Raporto

SAEF-pliperfektiga aranĝo

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojoj okazigis la 15-an de novembro sian 41-an GERI-renkontiĝon kun ĝojiga nombro de gpartoprenantoj.

Jam iom antaŭ la 9-a horo la unuaj interesuloj aperis en la moderna "Dreilinden-Zentrum" en Rotkreuz.

Baldaŭ montriĝis, ke la ĉeestantoj ĉefe venis por unufoje apliki esperanton. Sendube la ofertita programo sukcesis veki aldonan entuziasmon kaj ne estis mirinde, ke dum la komuna tagmanĝo eĉ la servistaro neintence estis alparolata en la Lingvo internacia.

Ke esperanto bonege taŭgis kiel komunikilo ankaŭ por la distra programparto, tion pruvis la ofte laŭtaridado de la partoprenantaro.

La respondecajn organizantojn de la kunveno ĝojigis la fakto, ke fine de la aranĝo jam estis demandoj rilate al venonta "Gaja Esperanto-Rondo Instruiteca". Tiu ĉi okazos la 13-an de marto.

Programo

Marte 13: 42-a GERI (Gaja Esperanto-Rondo Instruiteca) en "Zentrum Dreilinden" en Rotkreuz.

Aprile 3: Ĝenerala Kunveno de SAEF en "Zentrum Dreilinden" en Rotkreuz.

La estraro de SAEF informas pri sia konsisto:

Prezidanto: Gertrud Eggenberger
Wurmbühl 10, 8405 Winterthur.
Tel.: 052 233 47 64.
gertrud.eggenberger@bluewin.ch

Sekretario: Ernst Glättli
Laurstr. 17, 5200 Brugg.
Tel.: 056 441 53 09.

Kasisto: Hans Meier
St.Galler-Ring 61, 4058 Basel.
Te.: 061 692 86 36.

Asesorino: Annelies Fiechter
Jägerstr. 12, 4058 Basel.
Tel.: 061 692 86 36.

UEA

Ĉefdelegito en Svislando

François RANDIN

Av. de Chailly 10, CP 246, 1000 Lausanne
22.

Tel. 076 411 14 55, fakso 021 657 14 56.

Ret-adreso: esperanto@isuisse.com

poŝtkonto: 10-121498-1

Osmo Buller revenis

La 22-an de decembro la Estraro de UEA nomumis ĝenerala direktoro s-ron Osmo Buller, kiu estas bone konata, ĉar ĝis la jaro 2002 li jam plenumis la koncernan funkcion. Antaŭ du jaroj li preferis alian laborlokon, sed li rekandidat-

iĝis agnoskante, ke li povas kunlabori kun la nuna UEA-Estraro sub la prezido de Renato Corsetti.

Pri la 89-a Universala Kongreso

La venonta Universala Kongreso okazos en Pekino (Ĉinio) inter la 24-a kaj la 31-a de julio. Interesatoj mendu la aliĝilon al François Randin.

La Agentejo vojaĝa Helvetic Tours proponas flug-vojaĝon al Pekino per Lufthansa tra Frankfurto: Fr 1200. Interesatoj petu la aliĝilon al François Randin.

Membrokotizoj al UEA por 2004

François Randin kolektas la kotizojn al UEA. Tiucele li dissendis pagilon al la UEA-membroj. Se vi ne ricevis la koncernan informilon kaj ŝatus aliĝi al UEA, petu ĝin al François Randin.



Genève
Tacconnerie
16. 7. 60

Desegnaĵo de Charles Baudouin farita la 16-an de julio 1960: La preĝejo de Tacconnerie en Genève.



Loka vivo

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel, Tel.: 0049 76 214 57 12
Kunvenoj: 20h00 en la kelo de la malantaŭa
domo, Riehenring 129.

Raporto

Jarraporto estas okazo trarigardi, kio estis planita por la jaro kaj kio efektive okazis.

En januaro okazis nia ĝenerala jarkunveno en nia kunvenejo Haltingerstrasse 97. Februare ni estis invititaj ĉe Hans-Peter Senn por en tre agrabla etoso manĝi bonegajn ĉinan fonduon kaj desertaĵon.

En marto ni vizitis la karnavalon kaj ludis skrablon. Kaj aprile okazis en Basel la SES ĝenerala jarkunveno kun multe da partoprenantoj. Du tamburistoj malfermis la kulturan parton, en kiu Claude Gacond kaj Andy Künzli rakontis pri la historio de SES fariĝonta centjara en septembro. Fine de la aprila monato Hans-Peter Senn prezentis al ni belegan prelegon pri Sicilio.

En majo ni faris nian jam tradician viziton ĉe Berthe Spalinger por sur ŝia

agrabla teraso manĝi bonegajn nudelan salaton kaj desertaĵon. La 21-an de aprilo kelkaj el ni partoprenis la migradon al Kaiserstuhl kun partoprenantoj el Besançon, Nancy, Mulhouse, Gérardmer, Weil am Rhein kaj Freiburg. Post vizito de Breisach ni piknikis sur Schelinger Höhe en tre agrabla etoso.

En junio ni minigolfumis en Grün 80, kie troviĝis tre interesa ekspozicio de skulptaĵoj. Ĉar pluvis ni diskutis agrable en la restoracio.

En julio ni feris.

Kun belega kaj varmega vetero nia jam tradicia ekskurso kondukis la grupon al Allschwil sub la gvidado de Hans-Peter Senn. Ni marŝis al Bachgraben kaj tra Allschwil al la domo mem de Hans-Peter Senn, kie ni kradorostis kolbasojn kaj babilis en agrabla rondo. Estis vere tre bela ekskurso.

En septembro ni rakontis pri niaj ferioj. La 27-an de septembro kelkaj partoprenis la jubileon de la fondo de SES en Lausanne kaj Rolle kun bela kultura programo kaj bona etoso.

En oktobro ni rakledumis en agrabla rondo ĉe la familio Bérout-Focke kaj havis la viziton de Perla Martinelli kaj de Giorgio Silfer.

Novembre ni planis nian novan programon kaj en decembro ni travivis la zamenhofan feston en Freiburg. Tie ni dispartiĝis en tri grupojn ĉu por iri al la kristnaska foiro, ĉu al la montaro, ĉu al Radio Dreieckland. Post la vizitoj ni kafumis en la restoracio Güner Baum, aŭdis interesajn prelegojn, bone manĝis kaj babilis kaj finfine ludis pri Freiburg. Estis agrablaj posttagmezo kaj vespero.

Ni ĉiam renkontiĝas en nia eta salono malantaŭ la preĝejo kaj, kvankam ĝi ne estas granda salono, ĝi estas tute taŭga por niaj renkontiĝoj, des pli ke la posedantoj faras al ni tre favoran prezon.

Nia informilo plibeliĝis. André Grossmann ĉiam pretigas, presas kaj forsendas al ni belegan bultenon kaj ni dankas al li por tiu laboro.

Ĝenerala kunveno

Januare 29: Ĝenerala jarkunveno. Komenco je la 20h00. Tagordo: 1. Bonvenigo. 2. Elekto de la tagprezidanto. 3. Protokolo de la ĝenerala jarkunveno 2003. 4. Aliĝoj kaj eksiĝoj. 5. Raportoj a) de la prezidanto. b) de la kasisto kaj kaskontrolantoj. 6. Senŝarĝigo de la estraro. 7. Elektoj a) de la prezidanto, b) vicprezidanto, c) kasisto kaj kaskontrolantoj, d) sekretario. 8. Kontribuo a) al KCE, b) al pacmovado; c) al la junuloj. 9. Proponoj. Tiujn bonvolu skribe sendi prezenton ĝis la 19-a de januaro al Esperanto-Societo Basel. La estraro esperas, ke vi multnombre ĉeestos la kunvenon.

Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

Esperanto-Infos: & 022 740 04 45

Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon de la monato je la 20h00 en la restoracio «Aux Cheminots», 7, rue des Gares, Genève. Komuna vespermanĝo ekde la 19-a horo.

Ekspozicio en la muzeo de Carouge pri Charles Baudouin novembre 29 - januare 18

Inaŭgure al tiu ekspozicio okazis
Kolokvo pri Charles Baudouin
pri kiu raportas Claude Piron

La kolokvo pri Charles Baudouin estis neatendite sukcesa. Ĉiuj prelegoj estis tre interesaj, kaj la salono estis plenplena, kio surprizis la organizintojn.

Historiistino, kiu instruas en Novjorko (City University of New York), Antoinette Blum, en sia prelego pri "*Charles Baudouin; un Européen à l'écoute du monde*", iom detale priparolis la esperantistecon de Baudouin, montris, kiel ĝi akordas kun ĉiuj aliaj trajtoj de lia karaktero (strebo al universaleco, emo solvi konfliktojn per dialogo anstataŭ perforto, rifuzo aliĝi al unu kulturo pli ol al alia, ktp.) kaj kiel, aparte, ĝi ligiĝas al lia pacismo, kiu igis lin amiko de Romain Rolland. Ŝi parolis pri tio tute pozitive.

Dum la demanda periodo post ŝia prelego mi enmetis en demandon mencion pri esperanto kaj preterpasante


alvenis al la Placo de la Nacioj. Tie ni grupiĝis ĉirkaŭ la fama tripeda seĝego kaj ĉiuj banderoloj estis montritaj kaj fotitaj. Alvenis ĵurnalisto, kiu faris kelkajn fotojn. La etoso de la manifestacio estis tre agrabla kaj ni tre ĝoje konatiĝis kun esperantistoj kaj de la regiono kaj de malproksime.

Bedaŭrinde pro la tre malvarma vetero kaj ankaŭ pro tio, ke multaj homoj ĉeestis en la malnova urbo la Murgrimpadan Kuradon (la course de l'Escalade), ni ne havis grandan spektantaron. Ni ĉiuj finis la manifestacion ĉe Antonio, en la Restoracio de la Fervojistoj, kie ni kutimas kunveni. Kompatinda Antonio! Li ankoraŭ ne renormaliĝis!"

Pri nia manifestacio raportis la gazeto *Tribune de Genève* per mallonga, sed trafa artikoleto.

Persone, post la manifestacio, anstataŭ revarmigi min kun la aliaj ĉe Antonio, mi tramis al Carouge por en ties plaĉa muzeeto nepre viziti la ekspozicion pri Charles Baudouin. Mi konstatis, ke la dokumentoj pri lia esperantisteco estis trafe prezentitaj en bone lokita montro-budo, kaj mi refoje konvikiĝis pri la eksterordinara vario de la aktiveco de tiu psikiatro, pedagogo, prelegisto, verkisto, tradukisto kaj vera artisto. La reprodukto en nia bulteno de du el lia desegnoj komprenigas, kial mi reiris kun mia edzino por admirigi al ŝi la desegnaĵojn de Charles Baudouin.

Claude Gacond



La kvartalo "Untere Schipfe" de Zŭrich desegnita de Charles Baudouin la 10-an de aŭgusto 1958.

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale 389, 1009 PULLY

Tel: 021 729 58 02

<esperanto@isuisse.com>

<<http://www.esperanto.ch>>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00.

Kunvenoj

Januare 19: je la 20h00, bufedo de la CFF-stacidomo (1-a etaĝo): Projekciado de 3 filmoj NANDIRealigado de François Randin: 100-jara jubileo de Svisa Esperanto-Societo en Ouchy-Rolle je la 27-a de septembro 2003; 88-a Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo en 2003 kaj Intervjuo de Andrej Korobejnikov, pianisto 17-jaraĝa.

Februare 2: Ĝenerala Asembleo.

Marte 1: (programo decidota).

Aprile 5: Kun Claude Gacond: Kiel prezenti esperanton al ĝenerala publiko, al instruistoj, al poliglotoj.

Maje 3: (programo decidota).

Junie okazos ekskurso.

Raporto

Dimanĉe 14-an de decembro dudeko da societanoj rendevuis en la restoracio "Le Milan" por la Zamenhofa Festo. La lotoludo estis riĉe provizita de bele pakitaj lotaĵoj kaj poste manĝeto donis eblon gustumi abundon da frandaĵoj. Pri tio interese raportas la plaĉe ilustrita januara numero de la laŭzana *Informilo*, en kiu oni povas legi la bele pri-pensitajn salut-vortojn de Charlotte Blanc-Maillard, kiu februare forlasos sian prezidan funkcion okaze de la ĝenerala asembleo.

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo
Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke
Tel.: 041 280 46 12.

Ĉiuj kunvenoj, kiam lok-indiko mankas, okazas ĉe la hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstrasse 8, 6020 Emmenbrücke, tute proksime de Seetalplatz, facile atingebla per la trolebuso n-ro 2 kaj la fervojo. (De norde eblas veni aŭtobuse de Beromünster-Rothenburg.)

La unuan merkredon de ĉiu monato - krom aŭgusto kaj oktobro - konversacia rondo de la 14h00 ĝis la 16h00 kun Franz Brügger en la restoracio Simplon, Habsburgerstrasse 14, Luzern.

Kantono de

Neuchâtel

La Chaux-de-Fonds
Studaj rondoj ĉe CDELI

La lasta kunveno 2003-a de la 9-a de decembro, kiu estis dediĉita al la projekcio de la filmoj de François Randin pri la centjara jubileo de SES en Ouchy kaj Rolle je la 27-a de septembro kaj pri la 88-a UK en Göteborg, altiris 9 personojn, kiuj dum la posta teuma babilado esprimis sian admiron de tiuj filmoj.

La vesperon de la 6-a de januaro disvolviĝis kun 3 partoprenantoj. Ĝi komenciĝis per laŭtleĝo de la unu-akta komedio "*Bona vespero*" de Alfred Gehri, kiun Claude Gacond siatempe esperantigis por prezento en SES-kunveno. Sekvis frando de reĝkuko alportita de Jeanine Jeanneret, kaj estas ŝi, kiu gajnis la kuk-figureton sub formo de toreadoro. Ĉiu ricevis la belan prospekton de la ekspozicio dediĉita al Charles Baudouin kaj admiris liajn desegnaĵojn. La konkluda parto de tiu agrabla vespero estis dediĉita al esperantigo de la komenco de lia rakonto pri lia alveno en Carouge en 1915.

Kiel tasketo por la vespero de la 20-a de januaro estis proponita esperantigo de la unua paĝo de historieto de la neŭŝatela sekcio de la Svisa Alpa Klubo. Kaj André Sandoz, kiu multe legas, promesis prezenti romanon de Serge Elgo.

Kiuj ŝatas praktiki esperanton, tiuj notu la datojn de la venontaj vesperoj: januare 20, februare 3 kaj 17, marte 9 kaj 23, majo 4 kaj 18, junio 8 kaj 22, de la 20h00 ĝis la 21h45 en la salono de CDELI.

Claude GACOND.

Vevey

L'espéranto

une langue bien vivante

Ekspozicio en "Magasin du Monde"

Sub tiu ĉi pozitiva nomo, Claude Gacond muntos, kun Charlotte Blanc-Maillard kaj Yvette Goy, ekspozicion pri esperanto, kiu dum la tuta februara monato, ekde la vendredo 6-a, estos vizitebla en la art-galerio de la butikoj *Magasin du Monde*, rue du Conseil 20 en Vevey. Por konigi esperanton, vizitigu tiun ĉi ekspozicion al viaj familianoj, amikoj kaj kolegoj.

Wil

Esperanto-Klubo Wil

Prezidanto: Stanislaw POCHANKE, Lettenstrasse 70, 9500 Wil. Tel.: 071 911 68 30.

Vicprezidanto: Verena CHAVES-WALDER, Rosenhügelstrasse 22, 9230 Flawil. Tel: 071 393 41 49.

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19h00 en la Restoracio Blumeneck, Säntisstrasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

Venontaj kunvenoj

Februare 4: Jarkunveno.

Marte 3: Kun Barbara Pochanke: Pri la vivo de maljunuloj.

Aprile 7: Kun L. Sigriest: Aprilŝercoj.

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 Zürich-Seefeld

Tel.: 01 251 50 25 <info@esperanto.ch>

reto: www.esperanto.ch/zuriko

Grava informo: Niaj regulaj kunvenoj ne plu okazos sabatmatene. Anstataŭe estos la konversacia rondo merkrede kaj la libera kafejo dimanĉe. Bonvolu tion noti!

Programo

Februare 14:

11.00-12.00 matenmanĝego (kotizo Fr. 10.-)

12.00 Ĝenerala Kunveno/ Generalversammlung

Tagordo:

1) Protokolo de la antaŭa kunveno;

2-3) raporto de la komitato, kasisto kaj kaskontrolantoj;

4) Malŝarĝo de la komitatoj;

5-6) elekto de la komitato kaj kaskontrolantoj;

7) 100-jara jubileo de ESZ 2005;

8-9) buĝeto kaj fikso de la kotizoj;

10) decido pri proponoj (proponoj devas atingi la estraron ĝis la 1-a de februaro);

11) diversajtoj.

Konversacia

Studrondo

merkrede 16.00-17.00

Ĉiun merkredon.

Aliĝo ĝis la tago antaŭa. Tel: 01 251 50 25 aŭ retroŝto info@esperanto.ch

(kotizo se 2 partoprenantoj po Fr. 20.-, se 3 po Fr. 15.-, se 4 aŭ pli po Fr. 12.-)

[Konversationsstudienrunde jeweils
Mittwoch 16.00 – 17.00: Jeden
Mittwoch Nachmittag. Anmeldung
jeweils bis am Vortag unter Telefon 01-
251 50 25

oder E-Mail info@esperanto.ch.
(Kurskosten bei 2 Teilnehmern Fr. 20,
bei 3 Teilnehmern Fr. 15 bei 4 oder
mehr Teilnehmern Fr. 12.-)]

Malfermita Kafejo/Klubo **dimanĉe 14.00-17.00**

Dimanĉe de la 14.00 – 17.00 la
Esperantejo estas malfermita al
esperantistoj, krokodiloj, geamikoj kaj
interesuloj por ludoj, konversacio kaj
kafumado, regule ankaŭ okazas
prezentadoj.

Sonntags von 14.00-17.00 ist das
Esperantejo geöffnet für Esperantisten,
Nicht-Esperantisten, Freunde und
Interessenten für Spiele, Konversation
und Kaffee.

Datoj de la malfermita kafejo-klubo:
Daten des offenen Cafés/Klubs:
18.01; 01.02; 08.02; 15.02; 22.02;
29.02.

Membroj de Esperanto-Societo **Zuriko:**

Bonvolu pagi vian kotizon 2004:

Fr. 12.- Poŝtkonto: 80-17287-1

Nia kotizo estas tre modesta, sed vi rajtas
libere rondigi la sumon precipe konsiderante
la planitajn aktivecojn por nia jubilea jaro
2005.

Mitglieder der Esperanto-Gesell- **schaft Zürich:**

Bezahlt bitte Euren Mitglieder-
beitrag für 2004: Fr. 12.-.

Unser Mitgliederbeitrag ist äusserst be-
scheiden, aber Ihr dürft ihn selbstverständ-
lich beliebig aufrunden, insbesondere im
Hinblick auf unser Jubiläum 2005.

Niaj pioniroj

Alfred-Paul Dubois kaj Edouard Ducommun

Enkondukaj vortoj de Claude
Gacond:

Dum la jubilea renkonto okazonta la
24-an de aprilo en Les Brenets, per
ekspozicieto de la historiisto de tiu
vilaĝo, s-ro Pierre Deléglise, ni konat-
iĝos kun la eksterordinaraj personecoj
de la instruisto Edouard Ducommun kaj

de lia lerneja direktoro Alfred-Paul
Dubois. La legado de la sekvaj tekstoj,
kiujn esperantigis Claude Piron, ebligas
unuan renkonton kun esperanto-
pioniroj, pri kiuj nia movado povas
reale fieri.

Alfred-Paul Dubois

(10-a de februaro 1853 – 7-a de februaro 1918)

Naskita en Le Locle, Alfred-Paul Dubois, filo de Alfred Dubois, paciga juĝisto kaj oficisto por komunuma registrado, vizitadis la elementan, dua-gradan kaj industriajn lernejojn tiu-urbajn. Akceptita en la pedagogian sekcion de la Neŭŝatela Akademio, li akiris la ateston pri kapableco por unua-grada instruado, kaj, la 26-an de junio 1874, la ateston por la duagrada. Ekde la 12-a de aŭgusto 1872 li jam instruis en la tria jaro en Le Locle, kaj la 1-an de majo 1874 li iĝis direktoro de la elementaj lernejoj de tiu urbo, kie li restis ĝis la 12-a de aprilo 1912.

Dotita per eslorema menso li interesiĝis pri ĉio, kio povis faciligi interkompreniĝon. Li revis pri internacia lingvo. Kiam Esperanto aperis, li ĝin studis kaj diskonigis sian trovaĵon al grupo da instruistoj. Kun Edouard Ducommun, instruisto en Les Monts super Le Locle, kaj Paul Humberŝet, instruisto en la urbo, ili fondis la Loklan Esperantistan Grupon. La 9-an de decembro 1911, Alfred-Paul Dubois ricevis de Svisa Esperanto-Societo honoran diplomon agnoskantan lian kapablon instrui Esperanton.

Apud sia strebado disvastigi la internacian lingvon, A.-P. Dubois deziris krome eltrovi rapidan skribon. Tial li lernis stenografion laŭ la Aimé-Paris-sistemo. Li estis la unua, kiu uzis tiun skribmanieron en Le Locle. Rezulte, kiam la komerca lernejo malfermis kurson pri stenografio, oni tuj lin petis direkti ĝin, kaj tiun fakon li instruis al

multegaj klasoj da lernantoj ĝis li forpasis.

Se io povis igi la infanojn pripensi, aŭ helpis formi ilian kapablon juĝi, tio interesis lin, kaj li bedaŭris, kiom da tempo la lernejoj devis dediĉi al parkera lernado de ortografiaj reguloj, kiuj ne helpis evoluigi ilian kapablon pensi. Li sekve estis fervora adepto de la reformo de la franca ortografio, reformo, kiu dumtempe sukcesetis, sed kiu forŝvenis kun la unua mondmilito.

Lin allogis ĉio nova en multaj kampoj, sed tio ne signifas, ke li forturnis sin de la tempo pasinta. Male, li profunde studis historion, aparte la historion de Neŭŝatelo. Tiuteme li plurfoje prelegis, same kiel pri la disvolviĝo de la loklaj lernejoj, multe esplorinte en la arĥivoj.

Natursciencoj lin pasiigis. Ofte oni vidis lin haltinta ĉe arbarvoĵeto, kun mikroskopo ĉe-okule, por analizi maloftan planton aŭ fosilion malkovritan en geologia tavolo.

Inter la lernejoj, kiujn li konstante renkontis vizitante la klasojn, multaj apartenis al tre modestaj socitavoloj, vivantaj en aĉaj kondiĉoj veste, nutre kaj loĝe. Tial li asociiĝis kun tiuj, kiuj organizis la "lernejajn supojn", subtenis la instruistinojn, kiuj okupiĝis pri filantropa movado "Petit-Sabot" ("Eta Lignoŝuo") kaj estis unu el la fondintoj de la organizo por ferijaj infanrestadoj, kies kasisto li restis ĝis sia morto.

Denaska pedagogo, admiranto de Pestalozzi, modesta kaj bonvolema kiel li, li povus ripeti post Terenco: *"Homo mi estas, nenio homa fremdas al mi."*

Noto de Claude Gacond: Tiun tekston franclinge verkis fraŭlino Julie Dubois, la filino de Alfred-Paul Dubois, sekve al inform-peto de la historiisto Pierre Deléglise. Ŝi ankaŭ praktikis esperanton.

Edouard Ducommun

La klason de Les Monts [La Montoj] super Le Locle s-ro Edouard Ducommun komencis gvidi en 1884, kaj li konservis tiun postenon longatempe (dudek jarojn).

Edouard Ducommun estis personeco miriga kaj originala. Bonega pedagogo, li posedis talentojn plej diversajn. Li estis rimarkinda muzikisto, fajna beletristo, fizikisto, ĥemiisto, fotografo je profesia nivelo. Obstina kaj nelacigebla laboremulo, li aplikis siajn kvalitojn kaj inventan genion same bone en meĥaniko, fiziko kaj optiko kiel en meblofarado. Apud siaj eksterordinaraj kapabloj kampe de scienco, li estis akceptema pri ĉiuj novaj ideoj. Tiel li fariĝis unu el la pioniroj de esperanto, ĉar li vidis en tiu helpa lingvo potencon rimedon certigi pacajn rilatojn kaj reciprokan komprenon inter la homoj. Simile li advokatis reformon de la ortografio, kiu, liaopinie, povus konduki al grava simpligo en la instru-programoj. Kial skribi *alouette* [alaŭdo] kun unu *l*, kaj *allumette* [alumeto] kun du? Kial *ph* en *téléphone* dum la itala havas *telefono*? Kial *bataille* [batalo] kun nur unu *t*, dum estas du en *se battre* [batali], el kiu ĝi derivas? *Honneur* [honoro] kun du *n*, kaj *honorer* [honori] kun nur unu? Kian tempoperdon postulas la devo enmensigi al si tiujn gramatikajn nenormalaĵojn!

Li skribis al siaj amikoj per reformita ortografio. Liaj leteroj havis pro tio tute specialan etoson.

Malamiko de sociaj konvencioj kaj de ĉio neracia, Edouard Ducommun karakteriziĝis per kortuŝa simpleco kaj agrabla maniero rilati. Neniu mensogo eliĝis el tiu homo kun alta morala valoro. Aŭtenta kristano, kvankam li neniam eksterigis siajn religiajn ideojn, absolute sindonema, Edouard Ducommun estis bela animo, koro ora.

Facile do kompreniĝas, kiel profunde, pozitive kaj bene tiu bona instruisto influis la multajn generaciojn de lernantoj, kiuj havis la feliĉon sidi en lia klaso. Lia praktiko sekvis la principojn de "aktiva lernejo" longe antaŭ ol la esprimo "nova lernejo" disvastiĝis. Li havigis al siaj klasanoj memregadon. Ekster la komuna programo, la lernantoj formis etan lernejan societeton kun la tasko ornamati la klasĉambron. La anoj tie senceremonie diskutis, kaj la instruisto ne havis pli da rajtoj ol la infanoj. La Komitato konsistis el prezidanto aŭ prezidantino (ina voĉdonado jam estis akceptita), sekretario(in)o kaj kasisto(in)o. Ekzemple ili decidis aĉeti tri grandajn montrofakojn por pajloŝtopitaj birdoj, ŝtoniĝintaj bestoj, mineraloj, plus tri aliajn por insektoj, koleopteroj kaj papilioj.

Tiu geknaba societo zorgis ne nur pri la interno, sed ankaŭ pri la lokoj ekster kaj ĉirkaŭ la lernejo. La ĝardenon ili aparte atentis. Ili ellaboris planon kun vojetoj, floraroj, herbejoj, arbustoj. Ili alportis rokpecojn el apuda arbaro kaj post nelonge la ĝardeno elmontris sian buntan floraron neĝborulan, tulipan,

vinkan, peonian, eglanterian, apud la flav- kaj blu-iridaj ir-vojoj. Pinoj, abioj, platanoj kaj ĉeval-kaŝtanoj estis plantitaj. Antaŭe nuda, jen la lernejo de La Montoj transformiĝis en ravan verd-ejon.

La inventemo de Edouard Ducommun igis lin realigi mirigajn, eĉ strangajn projektojn. Li instalas inter la supro kaj la malsupro de la lerneja konstruaĵo elektran lum- kaj sonsistemon el piloj kaj ampoletoj. Sufiĉis premi la enirpordan tenilon por ekfunkciigi sonorilon duaetaĝe, informante pri ies alveno. Li eĉ elpensis... piedbatan ŝaltilon! Oni piedbatis la angulon de la ligna ŝtuparo kaj lampeto eklumis por prilumi la ŝtipejon. Ĉu ne ĉarma, tiu eta elpenaĵo, kiu karakterizas la inventan genion de tiu instruisto? Sed ekzistas eĉ pli bonaj. Edouard Ducommun trovis rimedon por ke, kuŝante en sia duaetaĝa lito, sen ellitiĝi, li povu igi fajron ekbruli en la teretaĝa klasformo: tion li atingis instalante sistemon por distance produkti elektran fajron, kiu ekbruligis la lignon pere de tindropeco.

Lia scienca menso ebligis al li mem prepari medicinajn preskribojn sen la perado de farmaciisto, ĉerpante el la cento da boteletoj, kiuj staris sur la bretoj en la supra parto de la mallarĝa koridoro de lia loĝejo.

Li mem fabrikis du aŭ tri fotoaparatojn. La unua, kiu ebligis sukcese produkti foton, konsistis el simpla kandelskatolo kun ronda truo kaj, funde, fotofilmo.

En lia familio regis plej bela harmonio. Edouard Ducommun edziĝis

al unu el siaj lernantinoj, Rose Droz. Sereneco, amo markis tiun idealan hejmon. La feliĉa paro havis tri infanojn: Félix, kun la sama spirito, la sama talento, kiel la patro, plus Nelly kaj Alice: tri geknaboj naturdotitaj per plej diversaj kapabloj. Oni ne enuis sub ilia tegmento. La familio formis etan orkestron. La patro kapablis ludi ĉiajn muzikilojn: pianon, orgenon, violonon, violonĉelon, kontrabason, fluton, klarineton, piŝtokornon. Li sidis ĉe la piano, al kiu li aldonis orgentipajn pedalojn. Félix violonĉelis, Nelly kaj Alice violonis, la unua mezviolone, la dua alde, dum kontrabase akompanis la edzino. Eblas imagi la etoson kreitan de tiu originala kvinopo, kiun la homoj nomis "la orkestro de la Montoj de Le Locle". Tiu simpatia muzikantaro multokaze prezentiĝis en Le Locle. Ĉiam estis por la aŭskultantoj mirinda regalo. Edouard Ducommun fondis alian orkestron, samnoman, de li direktatan, en kiu partoprenis s-roj Alfred Thiébaud (patro), Vital Huguenin, Paul Vuille, Willy Boillod kaj s-inoj Marie Lenz kaj Sophie Jacot, membroj de la lokla instruistaro.

Eblus verki tutan libron, plenan je ĝuindaj anekdotoj, pri la vivo de tiu rimarkinda instruisto. Ĉiuj, kiuj konis lin, konservis pri li luman memoron.

Pro la edukado de siaj gefiloj, kiuj devis eniri la duagradan lernejon, Edouard Ducommun konsentis, ege bedaŭre, forlasi sian karan etan Lernejon de La Montoj. Tio okazis en 1904, post dudek jaroj da instruado. Li akceptis en-urban klason en Le Locle, en kiu – memkompreneble – li sentis sin

malpli hejme, sed kiun li tamen stampis per sia tre speciala spirito. Li estis agrablega kolego, ĉiam preta maniere ĉiakampe helpi. Li forlasis la instruadon antaŭ la normala aĝo emeritiĝi kaj, en sia domo en Les Brenets, li plu nelacigeble laboris en la kampoj, kiuj interesis lin, partoprenante en ampleksa korespondado. Li plenumis historiajn esplorojn kaj direktis kant-kaj muziksocietojn. Kiam en la eta vilaĝo Les Brenets ĉiuj lampoj jam estis estingitaj, lampoj brilis plu en la Ducommun-domo. Sterniĝis antaŭ li, li emis diri, 300 jaroj da laboro kaj esploroj ĉiakampaj.

Li estis 87-jara, kiam li forpasis, en 1951, ĉirkaŭita de la estimo de ĉiuj

samlokanoj, de respekto kaj korigiteco de multaj amikoj kaj konatoj.

Ekzempla vivo, vivo labora, sindona, modela: tia estis la vivo de instruisto Edouard Ducommun.

Nota de Claude Gacond: Teksto ĉerpita el la verko "*Centenaire de l'Ecole des Monts*" de C.-B. Jeanneret, festanta la cent-jariĝon de la lernejo "*Ecole des Monts*" super Le Locle. Edouard Ducommun instruis en tiu ĉi lernejo ekde 1884 ĝis 1904, kiam konkludiĝis lia pionira provo instrui esperanton en publika unuagrada lernejo per kolekto de poŝtkartoj el la tuta mondo. La sukceso de tiu eksperimento famigis Edouard Ducommun en la neŭŝatela instruistaro kaj en la esperanta mondo.

Enketo

fare de Richard Schneller
pri Ivo Lapenna

Du publikaĵoj rememorigas al ni la personecon kaj agadon de Ivo Lapenna, iama kolono de la esperanto-movado.

La libron *Eseoj memore al Ivo Lapenna* (Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna, Danlando 2001) redaktis Carlo Minnaja (1940), universitata profesoro pri aplikata matematiko (esplorkampo: matematikaj metodoj en lingvistiko) kaj denaska esperantisto. Ekde sia junaĝo li amike rilatis kun profesoro Lapenna. Laŭ lia sperto la

hodiaŭa generacio apenaŭ konas la nomon de la iama longjara prezidanto de UEA. Amikoj, konatoj kaj siatempaj respondeculoj de UEA, kiuj rilatis kun Ivo Lapenna, surpaperigis siajn memorojn. Carlo Minnaja precizigas, ke ne temas pri *adorlibro*, kvankam ĝenerale la kontribuintoj rekonas la meritojn de tiu multtalentita homo kaj defendanto de la humaneca internaciismo, dum kelkaj esprimas sin tamen kritike pri iuj aspektoj de la agado kaj personeco de Ivo Lapenna.

Aperis ankaŭ alia artikolaro de diversaj aŭtoroj sub la titolo *UEA en la periodo 1970-1980* (Perspektivo, Konkurso-premio Miyoshi 2001, Roterdamo 2002), do traktante la periodon, kiam Ivo Lapenna estis prezidanto de UEA kaj poste retiriĝis.

Ivo Lapenna naskiĝis en 1909 en la urbo Split (Dalmatio, Jugoslavio) kaj studis en klasika gimnazio de la naskiĝurbo kaj en Zagrebo. Jam kiel studento li aktivis en la esperanta movado kiel kunfondinto en 1929 de Akademia Esperanto-Klubo kaj Studenta Tutmonda Esperanto-Ligo (STELO), kiujn li prezidis dum pli ol dek jaroj. Li doktoriĝis pri juro en 1933 en la universitato de Zagrebo kaj en la sama jaro finis tie siajn muzikajn studojn (violonĉelo) en la konservatorio.

De 1941 al 1945 li partoprenis la Naciliberigan Militon. Poste li iĝis profesoro pri internacia juro kaj internaciaj rilatoj en la universitato de Zagrebo. Sed en 1949 li forlasis Jugoslavion pro neakordiĝo kun la reĝimo de Tito, laboris du jarojn en scienca instituto CNRS en Parizo kaj fine fiks-iĝis en Londono, kie li iĝis universitata profesoro pri internacia juro, laste profesoro pri kompara soveta kaj orienteŭropa juro.

Liaj ĉefaj funkcioj en la esperanta movado estis: prezidanto de la Jugoslavia Esperanto-Ligo (1937-1950), ekde 1938 estrarano de Internacia Esperanto-Ligo (ekde 1947 de UEA), ĝenerala sekretario de UEA (1955-1964), prezidanto de UEA (1964-1974), fondinto de CED en 1952 kaj ĝia honorofica direktoro ĝis 1974. En

la sama jaro li sin retiris de ĉiuj funkcioj de UEA dum UK en Hamburgo, ĉar laŭ li UEA ne plu estis neŭtrala organizo (vidu *Hamburgo en retrospektivo*, 1975). Li iĝis kunfondinto de Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM) en 1980, prezidis ĝin kaj estis la ĉefa kunlaboranto de ties revuo *Horizonto*.

Ivo Lapenna estis unu el la plej elstaraj personecoj de la esperanto-movado, poligloto, juristo, verkisto, oratoro kaj konstruinto de la moderna UEA. Oficialan rekonon de esperanto kaj konsultajn rilatojn por UEA li atingis ĉe Unesko en Rezolucio de tiu organizo (1954).

Li famiĝis per festparoloj dum universalaj kongresoj, kreis oratoran konkurson kaj aŭtoris la libron *Retoriko* (1950).

Pere de CED li kreis seriozan informfakon rilate esperanton kaj kontribuis per granda parto al la enciklopedio *Esperanto en perspektivo* (1974).

Ivo Lapenna mortis la 15-an de decembro 1987 en Kopenhago.

Ni demandis al svisaj esperantistoj, kiuj persone konis lin, pri iliaj impresoj kaj travivaĵoj rilate al Ivo Lapenna.

Richard Schneller

Claude Piron kaj Ivo Lapenna

Richard Schneller:

Claude Piron, je kiu okazo vi konatiĝis kun Ivo Lapenna kaj kiuj estis poste viaj rilatoj?

Claude Piron:

Mi konatiĝis kun Lapenna en 1953 (mi estis 22-jara), dum mallonga restado en Londono. Mi vizitis la tiean Esperanto-Klubon, kaj li ĉeestis. Ni iom diskutis. Li rigardis min mire kaj diris: "*Vi parolas tute flue, kaj kun tute internacia prononco!*" kvazaŭ tio estus eksterordinara. Sed io supereca en lia tono, en lia rigardo, jam je tiu unua renkontiĝo malplaĉis al mi. Poste mi havis multajn okazojn rilati kun li. Ĉar mi laboris en, kaj poste por, internaciaj organizoj, mi estis iu utila, kiam li bezonis informojn aŭ dokumentojn.

Legante, kion mi diros ĉi-poste, bonvolu memori, ke mi ne povas esti senpartia. Mi do priskribos Lapennan, kia mi sentis lin, kaj eble la reala Lapenna estis malsama.

Richard Schneller:

Ĉar vi estas psikologo, mi scivolemus pri via opinio rilate la personecon de Ivo Lapenna. Sendube li havis fortan karakteron bataleman kaj memfidan por defendi kaj reprezenti esperanton antaŭ la ekstera publiko, sed interne de UEA ekestis kontraŭstaro de diversaj homoj, kiuj ne samopiniis kun li kaj trovis, ke li ne toleris opozicion. En la studo *UEA en la jardeko 1970-1980*, W. M. A. De Smet, kiu cetere rekonas la meritojn de Ivo Lapenna, parolas eĉ pri fazoj de paranojo ekde 1965 ĉe tre inteligenta

homo (sento de persekutiĝo, megalomanio) sin referante al la libro *Hamburgo en perspektivo*. Ĉu tiu diagnozo laŭ vi estas prava aŭ ĉu la politikaj kaj sociaj realaĵoj de tiu periodo de malvarma milito kaj junulara kontestado povus klarigi la sintenon de Ivo Lapenna ekŝiĝinte abrupte (eĉ rifuzante honoran prezidantecon) el UEA, por kiu li ja laboris dum jardekoj?

Claude Piron:

Lia memfido, kiu radikis en tre alta opinio pri sia supereco ĉiuflanka, multe kontribuis al la sukcesoj, kiujn li atingis por esperanto. Ĝi donis al li kuraĝon, aŭdacan, obstinan persistemon. La esperanto-movado ŝuldas al li multon, ekzemple la unuan Unesko-rezolucion, kiun li sola, per tre lerta diplomata manovrado dum la Ĝenerala Konferenco en Montevideo, sukcesis voĉdonigi, kaj kiu ŝanĝis multon en la posta vivo de esperanto. Aŭ la monumentan *Esperanto en Perspektivo* (UEA, 1974), kiu multege helpis al ĉiuj, kiuj deziris informi pri la lingvo (kaj en kies ellaborado partoprenis ankaŭ Tazio Carlevaro). Tamen miaj memoroj pri li estas trasorbitaj de la sento, ke li ne estis simpatia homo. Li estis kvazaŭ perfekta enkarniĝo de memcentreco, narcisismo kaj orgojlo. Laŭ PIV2 orgojlo estas "*tro granda memŝato, ne sufiĉe pravigebla kaj akompanata de malŝato por ĉiu alia*". Tia por mi estis Lapenna.

Li ne estis mensmalsanulo, ĉar li neniam perdis la kontakton kun la realo, li do ne estis paranojulo proprasence, sed tamen li havis la du ĉefajn

traĵtojn de paranojeca personeco: grandiozan ideon pri si mem (kun supereca maniero rigardi ĉiun alian), kaj oftajn sentojn esti atakata ne bazitajn sur io reala. Li estis ĉarma, sciis konvinki per sia maniero paroli, li estis ja elstara oratoro. Li estis ankaŭ bonega praktika psikologo per tio, ke li instinkte sentis, kiel tuŝi la korojn kaj trafi la erojn en la psiko, kiuj povos motivi al agado en la senco, kiun li deziris. Li estis ege inteligenta, kvankam kelkfoje kritika sento strange mankis al li: ekzemple li aliĝis al la stalinecaj, senbazaj doktrinoj de Marr pri lingvo, kvazaŭ estus normale akcepti teorion, kiun neniu fakto konfirmas. Tamen li estis tre kompetenta en sia fako, internacia juro. Li estis sincera kredanto pri la valoro de esperanto, sed li iugrade identigis sin al ĝi, tiel ke ĉio, kion li faris por la lingvo, li fakte faris por si mem (tio ne estas malofta en esperantio, kaj eble tiu diro validas ankaŭ pri mi). Li havis multajn kvalitojn, kiujn oni trovas relative ofte ĉe sukcesaj politikistoj: rapidegan cerbon, brilan retorikon, flekseblecon diplomatan, kapablon preskaŭ hipnotige ĉarmi... kaj ne plenan honestecon.

Li ĉiam senskrupule atribuis al si la laboron, kiun mi faris por li. Kiel persono, mi ne ekzistis por li, nur kiel ilo, helpilo. Ekzemple, sekcio 1.3.5 (paĝoj 20-24) de *Esperanto en Perspektivo* estas teksto, kiun mi verkis kaj kiu postulis de mi multajn horojn da esplorado en la dokumentoj de diversaj internaciaj organizaĵoj, sed li neniam havis pri tio eĉ privatan

vorton de danko (al mi estas egale, ke li ne diris publike, ke tiun sekcion verkis mi, sed ke li neniam dankis private, tion mi malfacile akceptas). Simile, en intervjuo pri la esperantigo de la *Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj*, li diris: "*Ni konsideris ĉiujn aŭtentajn tekstojn de la Ĉarto escepte de la ĉina, ĉar la ĉinan ni ne scias.*" Nu, en tiu laboro, mi konstante komparis la kvin tekstojn, inkluzive de la ĉina, kaj, se mi bone memoras, ĝuste atentante la ĉinan tekston mi malkovris la malsamajn sencojn de artikolo 111. Sed tion li forgesis. En tiu intervjuo li parolis, kvazaŭ li estus la ĉefa tradukinto, dum li fakte nenion faris, krom aprobi la finan tekston. La tradukintoj estis Ralph Harry, Eskil Svane kaj mi. Liaj negativaj trajtoj reliefigas, se mi komparas lin precize kun Ralph Harry, ambasadoro de Aŭstralio, viro politike kaj intelekto samnivela. Tiu estis same bona esperantisto, same bona diplomato, same inteligenta, kulturita, kompetenta, sed kun li oni sentis sin egalnivele traktata, respektata, kio neniam okazis kun Lapenna.

Mi bone konis Hans Jakob, kaj la maniero, laŭ kiu Lapenna parolis pri li, estis absolute neakceptebla. Sed kompreneble por Lapenna estis evidente, ke Lapenna ne povas erari. Ĉiufoje do kiam iu kritikis unu el liaj ideoj, aŭ proponis ion validan, kion ne li elpensis, li tion ne elportis, kaj reagis tre superece, humilige. Ĉar Hans Jakob ne hezitis malsamopinii, Lapenna traktis lin kiel aĉan, senvaloran insekton, kaj uzis pri li nekredeble humiligajn vortojn.

Se resumi mian subjektivan impreson: Lapenna estis homo, kiu jen kaj jen min bezonis kaj ekspluatis, sed kiu, strange, neniam vidis min. Mi supozas, ke li sin tenis same kun la aliaj, kvankam pri tio mi scias nenion. Sed kiom ajn malagrabla li estis almenaŭ kun kelkaj personoj, tamen la esperantistoj ŝuldas al li multon gravan. Esperanto estis je la servo de lia grandeco, sed ne gravas la motivo, gravas la rezultoj, kaj miaopinie la rezultoj, objektivite konsiderataj, sume estas tre pozitivaj.

Tazio Carlevaro kaj Ivo Lapenna

Richard Schneller:

Tazio Carlevaro, post apero de la *Eseoj memore al Ivo Lapenna* estus interese havi ankaŭ viajn rememorojn kaj vian opinion pri tiu grava persono, kiu forte influis la esperanto-movadon. Se mi bone memoras, vi konatiĝis kun Ivo Lapenna jam kiel studento.

Tazio Carlevaro:

Mi neniam okupiĝis, eĉ kiel juna homo, pri la internacia movado. Mi do estis nek funkciulo de TEJO, nek de UEA. Mi neniam partoprenis al UK. Mi konatiĝis kun Ivo Lapenna en Kolonjo, dum unu el la unuaj seminarioj de Germana Esperanto-Junularo, eble komence de la 60-aj jaroj. Mi estis 16-jaraĝa. Li prelegis, kun Lucien Laurat, pri la okcidenta kompreno de demokratio. Li multe impresis min, ĉar li parolis flue, klare, senakcente, kaj enhavoriĉe. Li havis personan ĥarismon tre evidentan. Mi

renkontis lin duan fojon, tre rapide, en La Chaux-de-Fonds, kelkajn jarojn pli malfrue. Li alvenis, povas esti en 1979, vizite. Sed fakte mi ĉeestis nur diskuton inter li kaj Claude Gacond.

Richard Schneller:

Dum multaj jaroj vi estis prezidanto de la konsulta komitato de CDELI, sed jam pli frue kunlaboris al la Centro de esplorado kaj dokumentado de UEA kaj poste kunaŭtoris la libron *Esperanto en Perspektivo*, kies ĉef-aŭtoro estis Ivo Lapenna. Kiujn rilatojn vi havis kun li?

Tazio Carlevaro:

Mi kunlaboris en la laboro de CED dum multaj jaroj. Mi sendis al Lapenna regulajn resumojn pri la enhavo de la tiam aperantaj interlingvistikaj revuoj (*The International Language Review, Progreso, Cosmoglotta...*). Fine, mi kunlaboris kun li en la pretigo de *Esperanto en Perspektivo*. Sed, fakte, kunordigis mian laboron Ulrich Lins, ne Lapenna. Do, fakte, kun Lapenna mi apenaŭ rilatis.

Richard Schneller:

Ivo Lapenna havis gravan rolon en la esperanto-movado kiel longjara prezidanto de UEA. Retrovide kion vi opinias pri lia personeco?

Tazio Carlevaro:

Mia impresio estas (nun, post tiom multe da jaroj), ke li estis homo, kiu profunde kredis je finvenkismo, ĉar li kredis, ke en la internaciaj rilatoj ekzistas speco de tendenco, aŭ de leĝo, kiu kondukas de multlingvismo al unulingvismo. Tiu tendenco venas,

parte, de postuloj de praktikeco, parte de kulturo, parte de justeco. Por li, tiu estis nediskutebla vero. Tial, li vetis favore al perdanta ĉevalo: esperanto. Fakte, li opiniis, ke vastan kaj oficialan akcepton de nacia lingvo en internacia rolo malhelpas kaj la sento de lingva justeco kaj demokratio, kiu enestas en ĉiu homo, kaj naciismaj sentoj. Laŭ mi, li eraris. La homoj ne zorgas pri tiuj valoroj, aŭ, se ili entute zorgas pri ili, ili tion faras parole, sed ne fare.

Dank' al sia ĥarismo li kapablis influi aliajn homojn, kaj transdoni al ili la certecon, ke esperanto estas tamen – kaj baldaŭ – centra elemento en la internacia komunikado. Iusence, li estis la enkarniĝinta espero de la esperantistoj. La oficialigo de esperanto ne estas nur espero de tiuj idealistoj, sed fakto efektiviĝonta, ĉar ekzistas historiaj fortoj, faktaj leĝoj, kiuj kondukas al ĝi.

Richard Schneller:

Ke Ivo Lapenna havis grandan influon pravas la ĵus aperinta libro sed ankaŭ liaj paroladoj, skribaj verkoj, sciencaj pritraktoj kaj lia organiza agado. Se li vetis pri la perdanta ĉevalo "Esperanto", ĉu vi mem vetas pri la gajnonto "La Angla"?

Tazio Carlevaro:

"Veto" estas metaforo. Li ne vetis versence, sed li kredis profunde je la ekzisto de leĝo, kiu gvidas la homan historion, de la aparteco kaj la diseco de la homaj grupoj, al pli granda unueco sur la bazo de justeco kaj demokratio. Tion bone rimarkis ankaŭ Sikosek, en sia verko. Iusence

Lapenna apartenis al la historiista skolo, kiel Hegel, kiel Croce, kiel Marx. La historio, por tiuj pensuloj, ne estas kolekto el pli-malpli hazardaj eventoj, sed havas ian sencon. Homo, kiu komprenas la sencon de la historio, povas antaŭvidi la eventojn. Fakto estas, bedaŭrinde, ke la historio havas neniun direkton, neniun internan leĝon. Ĝi evoluas sen reguloj kaj sen celo. En tiu senco, mi parolas pri "veto".

Claude Gacond kaj Ivo Lapenna

Richard Schneller:

Claude Gacond, je kiu okazo vi konatiĝis kun Ivo Lapenna?

Claude Gacond:

Mia unua renkonto kun Ivo Lapenna ne estis tre agrabla. Li venis al mi en La Sagne akompanata de Johann-Jakob Sturzenegger, la tiama svisa UEA-delegito, kaj kun librotenisto de UEA. Tio estis antaŭ mia edziĝo, do antaŭ la jaro 1958. Lia vizito havis du celojn:

Unue li volis instigi min kunagi kontraŭ Hans Jakob kaj li estis surprizita de mia vigla kontraŭstaro al la misfamiga kampanjo de UEA kontraŭ ties iama direktoro. Mi profitis la okazon por rememorigi pri la hontinda konduto de UEA sekve al la subita morto de Kreuz, kies vidvino restis sen monrimedoj. Ivo Lapenna povis konstati, ke mi bone konis la malfacilan vivsituation de Hans Jakob, kiu apud sia kvazaŭ nesalajrita laboro por UEA vivtenis sin per sekretaria laboro financita de la socialista partio favore al la kreo de pensiona asekuro por la

maljunuloj. Tiu konversacio montris al Ivo Lapenna miajn intimajn rilatojn kun Marcel Erbetta, kiun li estis ankaŭ vane vizitinta en Biel/Bienne kaj kun Edmond Privat en Neuchâtel, kiun li evitis renkonti.



Claude Gacond kaj Ivo Lapenna promenantaj en La Chaux-de-Fonds la 20-an de majo 1983.

La dua celo de la vizito de Ivo Lapenna estis fakte la statuta projekto de CDELI. Pri tiu temo ni iris diskuti en la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds, kie li miris pri la jam kolektita materialo. Fakte Ivo Lapenna rifuzis alporti la apogon de UEA al la fondo de CDELI pro du kaŭzoj: unue

li vidis en ĝi konkurencon al CED kaj ne komprenis mian ŝercon, ke CDELI estas tipe svisa afero, ĉar *li* estas alemana sufikso etiga: CDELI estas fakte nur eta CED, kiel *Kindli* estas eta *Kind*.

Okaze de miaj aliaj renkontoj mi konstatis, ke Ivo Lapenna estis fakte tro serioza por aprezi la ŝercojn.

Due Ivo Lapenna volis, ke al la nomo *Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale* ni aldonu la vorton *espéranto*. Li rifuzis la planlingvan neŭtralecon de CDELI, kiu ĝuste kaŭzis ĝian sukceson. Li bedaŭris la savon de arĥivoj de lingvoprojektoj konkurencaj al esperanto. Tiurilate li samopiniis kun pluraj esperanto-gravuloj, inter kiuj William Perrenoud, kiu instigis nin bruligi la neesperantajn dokumentojn. Tion li fakte faris kun la arĥivo de IALA, kiu restis en lia posedo.

Dum la 4 aŭ 5 postaj renkontoj mi konstatis, ke Ivo Lapenna ne povis kompreni la realan scian celon de CDELI. CED sin proklamis scienca, sed interlingvistike restis polemika institucio, kies tasko esti proklami la superecon de esperanto rilate al ĉiuj konkurantaj lingvoj, inkluzive al la franca kaj angla. Tiun polemikan rolon fakte endanĝerigis mia sinteno celanta al paco interlingva kaj al ĉesigo de la prigramatikaj disputoj propraj al la esperanto-mondeto. Ni tiam troviĝis plene en la ata-ita konflikto, kiun mi rifuzis partopreni.

Mi aludas ĉion tion, ĉar tiun ĉi unuan viziton konkludis agrabla manĝo

ita al analizo de stilaj apartaĵoj kaj do ankaŭ al legado de la **specimenaj** pastiĉoj de Henri Baupierre, Ivo Lapenna prenis la libron *Specimene* kaj tuj malfermis ĝin je la paĝo 77-a, kiu lin parodiis kaj ridekplodigis la partoprenantojn, kiuj unuafoje malkovris la koncernan tekston, pro la vereco de tiu mokaĵo. Ĉiuj kursanoj, kiuj estis jam informitaj pri la reala

nomo de la aŭtoro de *Specimene*, provis kredigi al Ivo Lapenna, ke verŝajne temis pri Gaston Waringhien kunlabore kun Kalman Kalocsay, kaj Ivo Lapenna pli malpli kredis ilin je ĉies ĝojo. Kiam li forlasis la rondon, ĉiuj relegis kun giganta entuziasmo la koncernan parodion de Henri Vatré, kiun ni citu konklude al mia rakonto:

UNIV. PROF. D-RO LAPENNA

Jura konsilisto


KONSILO

al la Esperantistoj emaj kritiki eminentulojn en nia movado.

Kun politikaj, juraj kaj etikaj konsideroj.

Nepre vin detenu!

Reprodukto permesata, sed kun fontindiko.



Kongresen

EŬROPA BUNTO

<http://europa.bunto.free.fr>

**Manifestacio
por lingva demokratio en
Eŭropo
Strasbourg, 9-an de majo**

Ja, esperantistoj fariĝas manifestemaj. Bone! Ili pli kaj pli emas montri siajn ideojn surstrate. Post la 6-a de decembro en Ĝenevo vi certe pretos por alia manifestacio.

Kiuj partoprenis la lastan Universalan Kongreson en Gotenburgo, tiuj certe ofte vidis koloran afiŝon por **Eŭropa Bunto**.

Retpaĝo: <http://europa.bunto.free.fr>

Svisoj staras for de Eŭropo, tamen ili ne povas ignori, ke ĉijare Eŭropa Unio pligrandiĝas ĝis 25 landoj, kaj ke tial kreskas la lingva problemo. Ĉu la solvo estos iu pseŭdo-multlingvismo favora al la 3 plej potencaj lingvoj? ompreneble esperantistoj ne povas akcepti tion, kaj tial necesas, ke multaj kuniĝos en Strasburgo la 9-an de majo.

Loko: Strasburgo (Francio), ĉe la Eŭropa Parlamentejo kaj la Eŭropa Konsilio.

Dato: Dimanĉon 9-an de majo (kiu estas la Tago de Eŭropo).

Formo: Libera elekto de la lingvo por la flagrubandoj; libera enteno de flagrubandoj (respekte al la deklaro de homaj kaj eŭrop-civitanaj rajtoj).

La retumantoj povas vidi sur la supre notita retpaĝo la nomon de Denis-Serge Clopeau, la sekretario de la organizantoj. Pluraj asocioj kuniĝis: Espéranto-France (UFE), Fédération Espéranto-Bretagne (FEB), Initiative pour une langue Commune pour tous les Européens (IF-LCE), Eŭropa Esperanto-Unio (EEU), Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL).

Sur la retpaĝo estas ankaŭ diskutisto, ideoj pri sloganoj kaj materialo, kaj aliĝilo por organizi veturadon. Eble svisoj povos vojaĝi karavane per trajno, tiucele vi povas min informi pri via partopreno.

Aliĝoj al: Nicole Margot, Chemin des Lys 4, 1010 Lausanne. Tel.: 021 653 47 28.

Retadreso: n.margot@bluewin.ch

Esperanto-Centro Kvinpetalo

FR-86410 Bouresse

Telefono el Svislando: 0033 5 49 42 80 74

Ret-adreso: kvinpetalo@club-internet.fr

Kursprogramo

Febuare 17-21: Kun Josée Lafosse: Praktikado de esperanto (por infanoj kaj plenkreskuloj).

24-28: Kun Georges Lagrange: Preparado al la skriba parto de Kapableco.

Aprile 6-10: Kun Anna Löwenstein kaj Renato Corsetti: Akirado kaj lernado de du lingvoj.

20-24: Kun Ed. Borsboom, Y. Dumoulin, O'Sulivano kaj geRapey: Shakespeare kaj ŝekspirajoj.

24: Je la 14h30: Ĝenerala Asembleo de Societo Yvonne Martinot.

Julie 7-11: Kun Evelyne Boilau kaj Hartmut Fielmann: Vivo kaj historio de pupoj kaj vestokudrado por bebopupoj "Petitcolin".

Aŭguste 6-11: Kun Lino kaj Anne-Sophie Markov kaj Guillaume Ternant: Pri muziko kaj kantoj – kun praktikado de esperanto.

17-21: Kun Janine Dumoulin kaj Georges Lagrange: Preparado al altaj studoj – kun eblo trapasi la skriban parton je la fino de la staĝo.

17-22: Kun Claude Nourmont kaj Brian Moon: Malkovro de romantika arto en Piktavio (Poitou).

-oOo-



Ivo Lapenna ĉe Kultura Centro Esperantista en pentekosto 1983 (20-23-ajn de majo) okaze de la bapto de la Domo Hector Hodler. Unuavice de maldekstre dekstren: René-William Perrenoud, la kasisto de KCE; André Sandoz, la prezidanto de Gastejo Edmond Privat; Claude Gacond, la direktoro de KCE; Ivo Lapenna kaj antaŭ li Pierre Berger, la arkitekto de Gastejo Edmond Privat.

Indekso enhava de **SES informas** **Jaro 2003**

Enkondukaj vortoj:

Por favori retrovon de artikoloj kaj de informoj aperintaj en nia organo jen ni publikigas indekson de la pasinta jaro.

La redaktoro: Claude GACOND

Mallongigoj:

e-a = esperanta
e-ista = esperantista
e-isto = esperantisto
e-o = esperanto
i-a = internacia
n = numero
p = paĝo
ps = pseŭdonomo de
vd = vidu

Signifo de la kampoj:

"Titolo de libro aŭ periodaĵo"
Nomo de agado aŭ renkontiĝo'

A

Addor Gervais: n5 p12.
Aebi TraugottRinaldo: n2 p8, n3 p12.
Aeby Yvonne: n2 p8, n4 p7.
'Agado 2003': n1 p6, 9, n2 p8, 13, n3 p12, 18, n4 p7, n5 p14.
Allemand Luc: n4 p5, n5 p5
Altherr Anita: n2 p8, n5 p5.
Amika Anjo: n4 p14.
Amrein Olivier: n5 p21.
Andréassian: n5 p12.
"Angoroj": n4 p13.
Anselme Jacques: n4 p7.
"Antropozofia animkalendario": n4 p22.
"Antropozofiaj gvidfrazoj": n4 p22.
Appius Guido: n3 p17.
Aroloviĉ Natalja: n4 p13.

Association suisse des éducateurs à la paix = ASEPAIX: n1 p7, 11.
Auld William: n2 p19.

B

"Babel": n4 p13.
Bach J. S.: n5 p4.
Bader Alfred: n3 p13-16.
Badoux Françoise: n2 p8.
Baghy Julio: n2 p24, n3 p28.
Bahaa Esperanto-Komitato de Svislando: n1 p20.
Bahaa Esperanto-Ligo = BEL: n1 p20.
Bahaismo: n1 p20, n2 p3, 24, n3 p3, 27.
Balsiger Charles: n5 p12.
Banet-Fornalowa Zofia: n5 p22.
Barkoviĉ Krešimir: n4 p12.
Bartenstein-Weith H.: n5 p11.
"Basler Volksblatt": n3 p13.
Baudat Maryse: n2 p8.
Baudouin Charles: n1 p18, n5 p25.
Baur Arthur: n2 p7-8, n4 p7.
Bebel August: n3 p15.
Beethoven: n5 p6.
Bélisle-Grosjean Marion: n4.p5, 20, n5 p4, 6.
Bélisle Romain: n4 p20.
Bélisle Samuel: n4 p20.
Belmont Leo (Blumenthal A.): n3 p13.
Bérout-Focke Nicole: n1 p3, 5, 17, n2 p3, 6, 20, n3 p3, 5, 11-12, 16-17, 20-21, 24, n4 p3, 16, n5 p16.
Berthet Lise: n4 p1, 13.
Berthon & Valat (kombistoj): n5 p12.
Bertolini Dante: n1 p19-20.
"Bibliografio de la verkaro de Henri Vatré": N1 P18.
Bibliothèque universelle: n1 p8.
Bickel Andres: n3 p24.
Bickel Camille: n3 p24.
Blanc Charlotte: n2 p16.
Blanchet Pierrette: n4 p7.
Blanke Detlev: n5 p5, 9
Blumental: n1 p20.
Blumenthal Alexander: n3 p13.
Bonnard-Wenger Colette: n2 p25.
Borel Jean: n1 p8, n2 p24, 32, n3 p27.
Borsboom Ed.: n2 p3, 15, 29-32, n3 p3-4, 16, 19, n4 p9.
Bourot Suzanne: n3 p32.
Bovet Pierre: n1 p22, n3 p11, n5 p11.
"Brasikfolio": n4 p17, n5 p16.

Braun August: n3 p16.
"Brazila E-isto": n1 p18.
Brélaz Daniel: n2 p17, n4 p5, n5 p4.
Breuner-Eglinger Hans: n3 p13.
Bringolf Alain: n4 p14.
Brügger Franz: n1 p19, n2 p21-22, n3 p25, n4 p19-20, n5 p25-26.
Brügger Margrit E.: n2 p21.
Brülisauer Maurus: n2 p21.
Brun Sonja: n1 p14-15, 21, n2 p22, n3 p16, 22, n4 p19-20, n5 p5, 27.
Bucher Rosmarie: n2 p21.
Buffet de la Gare (Lausanne): n5 p12.
Buhlmann David: n2 p8, n3 p12.
Burgbacher Laurent: n3 p10, n5 p6, 21, 24.
Bussy Fernand: n5 p12.

C

Calaprice Alessandro: n2 p8.
Carlevaro Tazio: n4 p7, n5 p5.
Cart Théophile: n1 p8, n5 p1, 11.
Cassino Filippo (arkitekto): n4 p18.
Castelli Giuseppe: n2 p21.
Catil Jo: n5 p15.
Catling John: n3 p15-16.
Caumont: n5 p12.
Cavalier Guy: n4 p14.
Cendrar Blaise (liceo): n4 p12
Centjara jubileo de SES (Lausanne-Ouchy, Rolle, Vevey, Les Brenets): n1 p3, 8, n2 p3-4, 12-13, 23, n3 p.3, 7, 10, 17-18, n4 p3-7, 16-18, 20-21, n5 p3-4, 19.
Centjara Jubileo E-a-Bahaisma, Zürich: n1 p3.
Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo I-a = CDELI: n1 p3, 6, 10-14, 18-19, n2 p3, 6, 13, 15-17, 23, 27, 31-32, n3 p2-4, 9, 19-20, 23, 31, n4 p1, 3, 8-10, 14, 18, n5 p3, 5, 9, 14-15, 17, 20, 25-26.
Charrière Adelaïde: n5 p21.
Chaves Gabriel: n3 p6
Chaves-Walder Verena: n2 p23, n3 p26, n4 p21, n5 p26-27.
Chmielik Danuta: n4 p8
Chmielik Tomasz: n3 p8, n4 p8-9.
Chmielik Tomak: n4 p8.
Christaller: n3 14.
Common Charmian: n4 p17.
Comptoir suisse: n5 p5, 11.
Corsetti Renato: n2 p6-7-8, n3 p32, n5 p5-8, 18.
"Cosmoglotta": n1 p12.
"La Côte": n5 p14.

Cotton Armand: n3 p24.
"Le Courier": n2 p7, n5 p14.
Croisier Suzanne: n3 p12.
Cseh Andreo: n2 p15, 29-32, n3 p4, 19, n4 p9.
Cseh Gabriella & Otto: ne p31-32.
Cseh-Metodo: n2 p30.

Ĉ

Ĉina E-o-Ligo: n4 p23

D

Dahan Lucien: n3 p21, 24.
Darbellay Christian: n3 p32.
Davis Yvon: n4 p14.
Degoul Franois (Francisko): n2 p19, n3 p21, n4 p13, n5 p22.
'Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj': n3 p7.
Deléglise: n2 p13, 23, n3 p3.
De Sabates Henri: n2 p18.
De Saussure René: n3 p11, 14, n5 p11-13.
Detting Annelies: n2 p22, n3 p25.
Deutschle: n3 p15.
Di Vetta Arlette: n1 p9, n3 p6, 9, 24.
Döring Erna: n3 p12, 16.
Dor Henri: n5 p13-14.
Dorthe Pierre: n4 p7.
Dovat Lucienne: n3 p12, 21.
Dragoumis: n3 p13.
Dubois: n5 p11.
Ducommun Edouard: n2 p3, 13, 23, n3 p3, 7, n5 p11-12, 19.
Duc Goninaz Michel: n4 p13.
Du Pasquier: n5 p12.
Durand Daniel: n4 p13.

E

Ecabert Charles: n1 p21-23.
Ecklin Karlota: n2 p21.
Ecklin Lilhane: vd. Wenger-Ecklin Lilhane.
Ecklin-Dessoulavy Richard: n2 p25.
Eggenberger Gertrud: n1 p15, n2 p19, n3 p22, n4 p15, n5 p5, 18, 23.
"edukado.net": n1 p11.
Eisenhut H.: n3 p13.
Ekspozicio pri esperanto: n5 p3.
Ekzamenoj: n3 p20, n5 p17
"El Popola ĉinio": n3 p15.
Eldonejo Iltis: n1 p18.
Elmer Peter: n2 p8.
Elsner Verena: n1 p9.
Emmerich Andreas: n2 p7.

"En Eŭropo ie": n4 p15.
"Enciklopedio de Esperanto": n1 p11.
"Enciklopedio (svisa kaj planlingva verkata de Andy Künzli)": n1 p5-6, n3 p7, 12, n4 p7, n5 p9, 14.
Enderby Kep: n4 p13.
"Eseoj memore pri Ivo Lapenna": n2 p18.
E-a Civito: n4 p12, 14, n5 p15, 17, 19.
"E-o" (UEA): n3 p14, n5 p13, 17.
E-o-Domo (Morges): n5 p12.
E-o-France: n5 p15.

E-o organizaĵoj lokaj:

Basel: E-o-Societo Basel = ESB: n1 p3-5, 16-17, n2 p3-4, 6, 20, n3 p3, 5, 9-10, 12-17, 23-24, n4 p3, 16-17, n5 p3, 15-16, 23.
Bern: E-o-Grupo: n1 p17.
Châteaud'Oex: E-o-Grupo: n5 p13.
La Chaux-de-Fonds: Studrondo: n1 p3, 19, n2 p3, 23, n3 p3, 26, n4 p3, n5 p3, 26.
Genève: E-o-Grupo La Stelo: n1 p3, 6, 17, n2 p20, n3 p3, 24, n4 p17-18, n5 p5, 15-16, 24.
Kantono de Neuchâtel: n1 p 19, n2 p23, n3 p26, n4 p20-21, n5 p26.
Lausanne: Laŭzana E-o-Societo: LES & Laŭzana E-ista Grupo & E-o-Grupo Frateco: n1 p3, 19, n2 p21, n3 p25, n4 p5, 18, n5 p3-4, 11, 15-16, 25.
Liestal: E-o-Grupo Liestal: n3 p17.
Luzern: Lucerna E-o-Societo = LES: n1 p3, 19, 21, n2 p3, 6, 21-22, n3 p3, 12, 25, n4 p3, 19, n5 p3, 5, 15-16, 25.
Lyon: Centre E-o = CERL: n5 p15.
Montreux: E-o-Grupo: n5 p13.
Morges: E-o-Grupo: n5 p12-13.
Mulhouse: E-o-Societo de Mulhouse: n3 p9-10, n5 p16.
Nyon: E-o-Grupo: n5 p12.
Renens: E-o-Grupo: n5 p13.
Sissach: E-o-Grupo Sissach: n3 p17.
Vevey: E-o-Grup: n5 p12.
Yverdon: E-o-Grupo Pestalozzi: n5 p12.
Wil: E-o-Klubo Wil: n1 p3, 20, n2 p23, n3 p3, 26, n4 p3, 21, n5 p3, 15-16, 26-27.
Zürich: E-o-Societo Zürich = ESZ: n1 p3, 19, n2 p3, 24, n3 p3, 26-29, n4 p21-22, n5 p3, 15-16.
"E-o 2": n2 p18, n5 p5, 27.
E-o-Edukistaro de Svislando: n1 p22-23, n3 p29.
E-o perkoresponde: n4 p6, 18.
"E-o sen mitoj": n1 p6.
"L'e-o vit": n4 p7.

"Espere despere": n4 p14.
"La Espero": n5 p4.
Europanto: n1 p7.
Eydelnath J.: n5 p12.

F

Fabrizi Chiara: n1 p2, n2 p2, n3 p2, 6, n4 p2, n5 p2.
Faillettaz Eugène.: n1 p8, n5 p5, 11.
"La familio de Anto Speri": n4 p13.
Fanconi (prof.): n2 p25.
Favre Alain: n1 p9, n3 p6, 20-21.
Feierabend J.: n1 p8.
"Femina": n2 p7.
"Feuille d'Avis d'Avenches": n5 p12.
"Feuille d'Avis de la Côte": n5 p12.
"Feuille Centrale de Zofingue": n 1 p8.
Fiechter Annelies: n3 p12.
Filali Renata: n2 p21.
Fleurdelys (bindistoj): n5 p12.
Focke-Bérout: vd.Bérout-Focke.
Fontannaz Nancy: n1 p2, 10, n2 p2, 15-16, n3 p2, 8, 19-21, n4 p2, 7, 9, 16, n5 p2, 20.
Forel August: n1 p20, n2 p24, n3 p27, n5 p13.
Franca E-o-Junularo: vd: Junulara E-ista Franca Organizo.
Francina C.: n5 p12.
Frauchiger Benno: n1 p6, 13-14, 16, n2 p16-18, 22, n3 p7, 10, 21, n4 p10-11, 17, n5 p5, 16, 21.
Fregonara Odette: n1 p9.
Frésard Michel: n1 p22.
Friot Jean-Noël: n3 p21.
Fruktoĝardeno de Esperanto: n4 p13.
"Fundamenta Krestomatio": n1 p15.

G

Gabbielli Wanda: n1 p9.
Gacond-Giroud Andrée: n3 p9-10.
Gacond Claude: n1 p2, 4-6, 9-12, 14-15, 18-19, 21, 23-24, n2 p2, 4-5, 7-8, 12-13, 15-17, 23, 27, 29-30, 32, n3 p2, 6-8, 11-12, 19-21, 26, 29, 31, n4 p2, 5-11, 18, 20-21, n5 p1-2, 4-5, 14, 16-17, 19-20, 25-26.
Gacond Gabrielle: n2 p27.
Gaja Esperanto-Rondo Instruiteca = GERI: n3 p22, n4 p3, 15, n5 p3, 18, 23.
Gandhi Mahatma: n2 p26.
Garino Kristian: n2 p19, n3 p21, n4 p11-12.
Gaudin Jean-Loup: n3 p12.
Gaugin: n3 p12.
Gausson Georgette: n3 p12.

Geiger Loretta: n4 p14.
 Germana E-o-Asocio = GEA: n2 p7, n3 p10.
 Germana E-o-Fervojoista Asocio = GEFA: n1 p15.
 80-a Germana E-o-Kongreso, Kaufbeuren: n3 p3, 32.
 Gesaga Nerina: n3 p15.
 Gesell Silvio: n3 p28.
 Gesellschaft für Interlinguistik, Berlin: n5 p9.
 Gianini-Aeppli Walter: n1 p9, n2 p8, n3 p12, 28-29.
 Giroud Andrée: vd. Gacond-Giroud Andrée.
 Glättli Ernst: n2 p8, 22, n3 p22.
 GončarovAnatolo: n5 p22.
 Goy Yvette: n4 p7.
 Goya: n3 p12.
 Grabowska Maria: n1 p9.
 Graf Bruno: n1 p2, 5, 7, n2 p2, 6, 8, 20, n3 p1-2, 5-8, 10, 20, 24-25, n4 p2, 5, 18, n5 p2. 4, 14-15, 19.
 La Grande Ourse (Granda Ursino): n1 p12-13, n2 p6-7, n3 p7, n5 p5, 9-10, 19.
 Grandjean Rémy: n4 p7.
 Grésillon = Grezijono: n2 p23
 Grosjean Joëlle: n1 p13-14, n2 p17, n3 p21, n4 p5, 10, n5 p6, 21.
 Grosjean Mireille: n1 p6, 11, 14, n2 p3, 7-8, 13, 19-20, 23, n3 p3, 7-9, 20-21, n4 p5, 7-8, 15-17, 20, n5 p5, 16, 18, 23-25.
 Grossmann André: n3 p6-7, 9-12.
 Grossmann Hans-Werner: n4 p7, 9, n5 p2, 14.
 Grütter-Häberli Lina: n3 p14.
 Guldin Margrit: n3 p6.

Ĝ

Ĝenerala Antropozofia Societo: n4 p22.

H

Häberli Lina: vd. Grütter-Häberli Lina.
 Hanisch Stefanie: n2 p18.
 Harry Ralph L.: n4 p7.
 Haupenthal Reinhard: n1 p18.
 "HeKo": n5 p19.
 "Heroldo de Esperanto": n1 p15, n3 p7, n4 p15, n5 p17.
 Herr Renate: n3 p21.
 Hermann-Luginbühl Hans (hoho): n3 p6.
 Hitler: n3 p15.
 Hodler Hector: n1 p9, n2 p7, 12, n3 p11, n4 p7, n5 p4, 13-14.
 Hörler Ernst: n3 p29.

Hoffmann (f-ino): n5 p12.
 'Homaj Rajtoj': n3 p7.
 Hotelo Ste-Luce: n5 p12.
 Hug A.: n1 p8.
 Hugi (ĵurnalistino): n4 p20.
 Humbert Charles (pentristo): n2 p16.
 Hund Adam: n3 p29.
 Hunkeler Ines: n3 p6.

I

Ido: n3 p14.
 IKEK-Konferenco, Bankja: n3 p32, n4 p24.
 Imfeld Gudrun: n2 p21.
 "L'Impartial": n2 p29, n4 p1, 16.
 "Indekso SES informas" jaro 2002: n1 p24-32.
 Institut de France: n1 p8.
 Instituto Jaccard: n5 p12.
 Interlingua (IALA): n3 p15.
 I-a E-o-Instituto = IEI: n2 p29, n3 p4.
 I-a E-o-Ligo = IEL: n5 p12.
 I-a E-o-Muzeo en Vieno: n5 p9.
 20-a I-a Festivalo, Kiel: n2 p3, n3 p3, n4 p3, 24, n5 p3.
 I-a Fervojoista E-ista Federacio = IFEF: n1 p15, n5 p18.
 55-a IFEF-Kongreso, Dresden: n1 p3, 15, n2 p3.
 27-a I-a Junulara Festivalo, Savona: n1 p3, 14, n2 p3, 18.
 I-a Junulara Kongreso: n5 p18.
 59-a I-a Junulara Kongreso, Lesjöfors: n1 p3, 14, n2 p3, 18, n3 p3, 21.
 I-a Kolektivo de E-istaj Komunistoj = IKEK: n4 p24.
 I-a Ligo de E-istaj Instruistoj = ILEI: n3 p9, 20-21, n5 p15, 18.
 "I-a Pedagogia Revuo": n5 p18.

J

Jaccard-Besson Marguerite: n2 p8, 12, n3 p12, n4 p5, n5 p5.
 Jaunin (presejo): n5 p12.
 Jayet Charles: n5 p5, 12.
 Jayet-Besson Jenny: n5 p5, 12.
 Jayet Marguerite: n3 p12.
 Jeanneret Jeannine: n2 p8.
 "Jes? kompreneble...": n1 p13, n4 p10, n5 p16.
 Jomini Paul: n5 p12.
 "Journal de Leysin": n5 p12.
 "Journal de Nyon": n5 p12.
 "Journal du Jura": n4 p8, 20.
 Jubileo de la centjarigo de SES: n1 p6-7.

Jufert Suzanne: n3 p11.
"Juna Amiko": n5 p18.
"La Juna Voĉo": n3 p29.
Junulara E-ista Franca Organizo = JEFO: n5 p21.
Junularo E-(ist)a Svislanda = JES: n1 p3, 13-14, n2 p3, 5, 16-18, 22, n3 p3, 8, 10, 21, n4 p3, 10-11, 17, n5 p3, 5, 15-17, 21-22.

K

Kaiser Hans-Georg: n4 p13.
Karlo la Grande: n5 p7.
Keable S.: n4 p24.
Keller Stefano: n1 p10, n2 p15-16, n3 p19-20, n4 p9, n5 p6, 20.
Ketterer Paul: n5 p12.
Koller Alois: n2 p8.
Konsilio de Eŭropo: n5 p17.
"Kontakto": n5 p18
Kooperativo de Literatura Foiro: n4 p18.
"Koresponda kurso por francelingvanoj": n3 p8
"Koresponda kurso por germanlingvanoj": n3 p8, 30, n4 p8.
Kovats(-Schmideliusz) Katalin: n3 p32, n4 p20.
Kreis-Schneeberger Clara: n2 p17.
"Krias lasilento": n4 p13.
Kristana E-o-Ligo I-a = KELI: n3 p29.
Künzli Andy: n1 p2, 4-5, n2 p2, 4-6, n3 p2, 7, 11-13, 17, 25, 29, n4 p2, 5, 7, n5 p2, n5 p3, 5, 11, 14.
Kuhl Celestina: n5 p21.
Kultura Centro E-ista = KCE: n1 p3, 14-15, 17, n2 p3, 6, 18, 22, 30, n3 p3, 6, 9, 16-17, 20-21, n4 p10-12, 14, n5 p3, 15, 17, 19, 22.
'Kultura Jubilea Internacia Semajno' (La Chaux-de-Fonds, Les Brenets): n2 p3, 13, 29, n3 p3.
'Kultura Trilanda Renkontiĝo': n3 p10.
"Kuriero de E-o": n3 p12, 16.
'Kvaropo': n1 p15.
"La kvina evangelio": n4 p22.
Kvinpetalo: n2 p30, n3 p4, 32.

L

Laborista Grupo E-ista: n3 p15.
Lang Franz: n3 p16.
Lanti Eŭgeno: n2 p30, n3 p16, n5 p19.
Lapenna Birthe: n2 p18.
Lapenna Ivo: n1 p15, n2 p18, n5 p7.
Lauer Elisabeth: n1 p2, 9, n2 p2, 8-9, 11, n3 p2, 6, 12, n4 p2, 7, n5 p14.
Lavanchy Eliane: n1 p9, n4 p7.

Lavanchy Jean-Jacques: n1 p9, n3 p21, n4 p7, 10, 12.
Lee Chong-Yeong: n4 p12.
Lehner: n3 p13.
Lelarge-Kovats Martin: n4 p20.
Lenin: n3 p15.
Leuenberger Samuel: n3 p15.
"La Liberté": n5 p14.
Libro-servo de E-o perkoresponde: n2 p16.
Ligo de Nacioj: n5 p7
Lingvoj:
angla: n1 p7, n5 p7.
germana: n1 p7.
"Literatura Foiro": n2 p30.
Lötschberg-tunelo: n5 p21.
Longchamp Antoine: n4 p7.
Lopes Antonio: n1 p9.

M

Mahö J. L.: n4 p13.
Maillard Gustave: n5 p12.
Mallet Edouard: n5 p12.
Mamin Jeanne: n2 p8, n4 p7.
Mamuzich Mirko: n3 p16.
Margot Nicole: n1 p2, n2 p2, n3 p1-2, 6-7, 9, 20-21, n4 p2, n5 p2, 5, 17.
Marguerat Dominique: n2 p8.
Martelmonto Jarlo: n4 p14.
Martinelli Perla: n1 p14-15, n2 p18-19, 29, n3 p21, n4 p12-13, n5 p17, 22.
Matisse: n3 p12.
Mayer Herbert: n3 p8, n4 p8, n5 p5, 8-9.
"Mefisto": n4 p13.
Meier L. E.: n3 p14.
Mellini Angelo: n2 p21, n3 p6.
Mellini Ruth: n2 p21.
Mexin A.: n5 p13.
Meyer Martin: n4 p16.
"La Migranto": n3 p16.
Minnaja Carlo: n2 p18.
Molnar Mónika: n1 p11-13, n2 p15, n3 p19-20, n4 p9, n5 p20, 26.
Mond-linguala Societo: n3 p14.
"Mondlingva Vortaro germana-e-a kaj e-a-germana": n2 p24.
Monod Hélène: n5 p12.
Morocz István: n2 p24, n3 p28.
Morocz Piroška: n1 p9.
"La mortula ŝipo": n4 p13.
Mosimann (kapitano): n4 p18.
Mottier (kombisto): n5 p12.

Mühlemann Barbara: n4 p7.
Mühlemann Daniel: n1 p14-15, n3 p21.
Müller Carla: n1 p22, n2 p21, n3 p6.
Murasaki Ando Viola: n4 p13.
Muzeo Beyeler, Basel: n1 p4-5, n2 p5, n3 p11-12.
Muzikmuzeo en Seewen: n1 p16.

N

"Nationalzeitung (Basel)": n3 p13.
Naville Ernest: n1 p8, n5 p11.
Nemere István: n4 p13.
Neo-Latino: n3 p15.
"Neologisma glosaro": n1 p18.
Nestlé s-ro: n5 p14.
"Neue Luzerner Zeitung": n2 p7, 22.
"Die neue Schulpraxis": n2 p8.
Nicolodi Ana Lisa: n4 p24.
Nicolodi Carlo: n3 p17, 32.
Niesert Ursula: n3 p8, 10, 24.
"Nokta fludo": n1 p18.
"Le Nouveau Quotidien": n4 p20.
Nüesch Willy: n4 p22.
Nuñez Hernández: n4 p13.

O

Occidental-Interlingue: n1 p12, n3 p15.
Oertle Karin: n1 p9.
Olšovanger Immanuel: n3 p14.
Orellana Atilio: n3 p4.
Ortelli Luciano: n2 p21.
Ostwald Wilhelm: n3 p14.

P

Pace Gilda: n3 p24.
Palaco de Nacioj: n4 p3, n5 p3, 24.
Para V.: n5 p6.
Parzival: n2 p8, n3 p12.
"Pasporta Servo": n5 p18.
"Paŝoj al plena posedo": n2 p19.
Pedrazzini: n3 p14.
Péquignot-Dumitrescu Raluca: n4 p14.
"(Per)koresponda kurso por franclingvanoj": n3 p8, n4 p18.
"(Per)koresponda kurso por germanlingvanoj": n3 p8, 30, n4 p8, 18.
Perréard Patrick: n3 p24.
Perrenoud René-William: n2 p27, n4 p7.
Perrenoud William: n2 p27, n3 p16.
Piazzetta Dante Bertolini (Locarno): n1 p19.
Piazzetta Esperanto (Locarno): n1 p19.

Picasso: n3 p12.
Piron Claude: n1 p17, n2 p3, 7, 12-13, 20, n3 p3, 7, 21, 24, n4 p5, 14, 17, n5 p5-6, 10, 16, 23, 25.
Piron Nicole: n2 p12.
Platz Hans-Dieter: n4 p24.
"Plena Ilustrata Vortaro de E-o = PIV": n3 p30-31, n4 p13, n5 p19.
Plutniak Arlette: n3 p32.
Pochanke B.: n3 p26, n4 p21, n5 p26.
Pochanke Stanislaw: n1 p20, n2 p23, n3 p26, n4 p21, n5 p26-27.
Pot (presejo): n5 p16.
Privat Edmond: n1 p9, 22-23, n2 p3, 12-14, 24-25, n3 p3, 7, 9, 11, 27, n4 p5, 7, 9, n5 p5, 11-12, 13-14.
Privat-Bouvier Yvonne: n2 p25.
Pulver Charlotte: n3 p14, 17.

Q

Qiyao Zhong: n4 p23-24.

R

Radio: n2 p19, n3 p7, 23, n4 p21.
Radio LORA: n2 p25
"Radio-Regionjournal Zentralschweiz": n2 p22.
Randin François: n2 p19, 21, n3 p1, 5, 7-8, 10, 20-21, 23, 25, n4 p4, 15, 18, n5 p4, 6, 16, 18, 25.
Razzmatazz (kvarteto): n4 p14.
Renard Théophile.: n1 p8, n5 p11-12.
Rey Kony: n2 p21-22, n4 p19.
Reymond Mady Lynn: n2 p8.
Reza Kheir Khah: n4 p23.
Richardet (fino): n5 p12.
Ringli Heinrich: n3 p16.
Rivière Jimmy: n3 p12.
Robert Jean: n5 p5.
Roessler Georg: n5 p22.
Rolland Romain: n5 p13.
Rooke Dieter: n1 p9, 14, n2 p11, 22, 24-25, n3 p8, 21, 27, 32, n4 p7, 17, 24.
Root (aŭ Ruth) Martha: n1 p20, n2 p24, n3 p27.
Ruckli monika: n2 p21.
Rusterholz H.: n3 p14.

S

Sack (librejo): n5 p12.
Saenger Jeanne: vd. Schmutz-Saenger Jeanne.
Saint-Exupéry Antoine de: n1 p18.
Sandoz André: n1 p9, n3 p12, 32.

"SAT-Amikaro": n4 p7, 24, n5 p15, 19, 24.
 SAT-antaŭkongreso (Grindelwald): n2 p3, 19, n3 p3, 21.
 SAT-Kongreso: n5 p19.
 SAT-Kongreso, Basel 1981: n3 p16, n4 p12.
 76-a SAT-Kongreso, La Chaux-de-Fonds: n1 p3, n2 p3, 23, n3 p3, 6, n4 p1, 12-15.
 Saussure de: vd: De Saussure.
 SBB/CFF: n5 p18.
 Schenk Alice: n5 p12.
 Schenk Cécile: n5 p12.
 Schenk-Roessinger (s-ino): n5 p12.
 Scherer Margrit: n2 p22.
 Scherer Paul: n1 p21-22, n3 p6, 25, n4 p19-20, n5 p26.
 Schild André: n3 p15.
 Schiller F.: n3 p14.
 Schmid Jakob: n3 p14, 17.
 Schmutz Hermann: n3 p15.
 Schmutz-Saenger Jeanne: n3 p15.
 Schmutz Marcel: n3 p15.
 Schneeberger Friedrich: n3 p13-14.
 Schneller Martine: n1 p9.
 Schneller Richard: n1 p2, 18, n2 p2, 29, n3 p2, 6, n4 p2, 7, 22, n5 p2, 6.
 Schoch Rudolf: n3 p29.
 Schram Jakvo: n4 p15.
 Schroeter Rémy: n4 p4-5, n5 p4, 6.
 Schubert: n4 p14.
 Schumann: n4 p14.
 Schweizer Kurt: n3 p16.
 Semmler Fritz: n1 p20, n2 p24, n3 p27.
 Senn Hans-Peter: n1 p3, 16-17, n3 p17, 23.
 Sennacieca Asocio Tutmonda = SAT: n3 p16, n4 p12-13, n5 p15, 18-19.
 "Sennacieca Revuo": n5 p19.
 "Sennaciulo": n3 p7, 16, n4 p15, n5 p19.
 Sennhauser Leonie: n3 p6, 26, n4 p21, n5 p26.
 "La Sentinelle": n4 p9.
 Siegriest L.: n3 p26.
 Sikosek Ziko Markus: n1 p6.
 Silber Giorgio: n2 p18, 29, n4 p12-13, n5 p17, 19, 22.
 Sixtus Pot Christiane: n2 p8, 11, n3 p8-9, 20-21, n4 p7.
 Skorupski Jan-Stanislaw: n3 p26.
 "Skribskrapeto": n5 p9.
 'Socia Forumo': n3 p7-8, n4 p3, 11-13, 17, n5 p23.
 Societo de Nacioj: vd: Ligo de Nacioj.
 Solo(tronik): n4 p14.

Spalinger Berthe.: n1 p3, 16-17, n2 p3, 20, n3 p3, 24.
 "Specimene": n1 p18.
 "Sprachspiegel" de SVDS: n3 p25.
 Stalin: n3 p15.
 Steele Trevor: n5 p18.
 Steiner Rudolf: n4 p22.
 Stoffer Daniel: n4 p7.
 Strasser Heinz W.: n2 p8, n3 p12.
 Stroele: n5 p11.
 Süß Reny: n2 p21.
 "Sud-Rejna Kuriero": n1 p17, n3 p9-10, n5 p16.
 Sütterlin: n3 p16.
 Suisana Unio por la propagando di la linguo internacia: n3 p14.
 Svisa Asocio de E-o-Fervojoj = SAEF: n1 p5, 15, 21, 23, n2 p5, 19, 22, n3 p3, 15, 22, n4 p3, 15, n5 p3, 5, 15, 18-19, 23.
 "Svisa Espero": n3 p12-13, 17, n5 p11.
 Svisa E-o-Junularo: n3 p8.
 "Svisa E-o-Revuo": n3 p12.
 Svisa E-o-Societo = SES: n1 p1, 3-9, 15, 18, 20-21, n2 p1, 4-6, 8-13, 20, 22, n3 p5-9, 12-17, 18, 20, 24, 29, 31, n4 p3-7, 9-11, 18, n5 p3, 5-6, 8-12, 14-17.
 "Svisa Esperanto-Societo informas": n1 p6, 13, n2 p6-9, 12-13, 19-20, n3 p1, 6-8, 10, 12-13, n4 p6, 11, n5 p3, 16-18.
 "Svisa Espero" n1 p1, 7-8, 23, n5 p11-12.
 "Svisa Fervojo": n5 p18.
 Svisa Kurtonda Radiostacio (Bern): n1 p21.
 'Svisa Specimena Foiro': n3 p14.
 Szabó István: n4 p13.
 Szerdahelyi István: n2 p19.

T

Tablettes (belvidejo), E-o-renkonto en 1908: n2 p1, 13.
 TANEF (Natur-amikoj): n3 p16
 Tavanti Berthe-Suzanne: n2 p29.
 Tavanti Corrado: n2 p27.
 "TEJO Tutmonde": n5 p18.
 "Tekste kaj pretekste": n1 p18.
 "Teletel!": n2 p22.
 "Tero de la homoj": n1 p18.
 Testaz Lisette: n4 p7.
 "Tiu toskana septembro": n2 p29.
 Todorov Jordan: n4 p13.
 Tomaszczyk Josef & Genowefa: n1 p9.
 La Tourne, E-o-renkonto en 1908: n2 p1, 14.
 "Tra l' silento": n5 p5.

Traven B.: n4 p13.
"Tribune de Genève"; n2 p7.
Tutmonda E-ista Junulara Organizo = TEJO: n2
p29, n4 p18, n5 p15, 17-18.

U

Ubis Frank: n3 p11.
Uhlmann Friedrich: n3 p14.
UNESCO (Unesko): n3 p9, n5 p17.
"Unikum": n2 p8.
'Universala deklaro de lingvaj rajtoj': n4 p13.
Universala Esperanto-Asocio = UEA: n1 p6, 21,
n2 p6-7, 19, 22, n3 p9, 17, 20, 23, 29, n4 p12,
15, 18, 23, n5 p5-6, 12, 14-19, 24.
Universala Kongreso: n5 p17.
2-a Universala Kongreso, Genève 1906: n5 p7-8,
13.
9-a Universala Kongreso, Bern 1913: n3 p14.
32-a Universala Kongreso, Bern 1947: n5 p7.
64-a Universala Kongreso, Luzern 1979: n2 p6,
n3 p16.
88-a Universala Kongreso, Göteborg 2003: n1
p3, n2 p3, n3 p3, 23, n4 p7-8, 15-16.
89-a Universala Kongreso, Beijing 2004: n5 p3.
Unuiĝintaj Nacioj = UN: n3 p9, n5 p17, 24.

V

Van Gogh: n3 p12.
"Varmas en Romo": n2 p27-29.
Vatré Henri: n1 p18, n2 p29.
Vaucher – Verstraelen Mireille & Lucien: n2 p8.
Vaŭdo (Vaud): n5 p11-14.
"Vespera Horo": n3 p17.
Vilhelmo (regestro): n3 p15.
[Vingt] "24 Heures": n5 p14.
Viredaz Marguerite: n2 p8, n4 p7.
Vischer Eva: n3 p24.
Visy Tarzicia: n3 p12.
"Vivo de Andreo Cseh": n2 p29, n3 p4.
Von Büren Jean-Thierry: n3 p6, 20-21, n4 p5,
14, 16, n5 p4, 22.
Vuillemin Joëlle: n3 p12.

W

Wadolowska Teresa.: n3 p26, n5 p26.
Wagnière Annemarie: n2 p8.
Wailbacher: n3 p14.
Walder Eliosabeth: n5 p26
Walder Otto: n3 p22.
Waltisbühl Anton: n3 p14.
Wanner Suzanne: n2 p8.

Weibel J.: n3 p16.
Weidmann Armin: n4 p7.
Weidmann Dietrich M.: n1 p2, 20, n2 p2, 7, 25,
n3 p1-2, 6, 9-10, 20, 28-31, n4 p2, 21-22, n5 p2,
5, 16.
Weidmann Nelida: n3 p6, 21, n5 p16.
"Weltsprachenwörterbuch Deutsch-E-o, E-o-
Deutsch": n3 p 9, 29-31.
Wenger Alfred: n2 p25-27, n3 p6.
Wenger-Ecklin Liliane: n2 p25-26, n4 p7.
Wenger Jean: n5 p11.
Wenk Eduard: n3 p13-14.
Wenk Fritz: n3 p13-14.
Wetstein Henri: n2 p8, n3 p12.
"Wilhelm Tell" de F. Schiller: n3 p14.
"Wörterbuch deutsch-e-o kaj e-o-deutsch": n3
p30.

Y

Yersin: n5 p12.

Z

Zamenhof Adamo: n5 p11.
Zamenhof Leizer: n2 p22, 24, 26, n3 p13-14, 25,
27, n4 p9, 20, n5 p7-9, 11, 13, 26.
Zamenhof Lidja: n1 p20, n2 p24, n3 p27, n5
p22.
Zedong Maŭ: n4 p17.
"Zeitpunkt": n2 p8.
Zelazny Walter: n4 p12-13.
Zimmermann Werner: n3 p28.
Zofingue (Studenta societo): n1 p8.
André Sandoz, la prezidanto de Gastejo Edmond
Privat
Claude Gacond, la direktoro de KCE
Ivo Lapenna
kaj antaŭ li Pierre Berger, la arkitekto de Gastejo
Edmond Privat.

-oOo-